**pomo** (яблоко), **pomujo**=**pomarbo** (яблоня);  
**angla** (английский язык), **Anglio**=**Anglujo** (Англия); **Rusio**=**Rusujo** (Россия);  
**ujo** (вместилище, емкость; футляр; сосуд).



bela bildo



junulino sur marbordo estas



abelo sur flava floro estas



policanoj kaj policistinoj



prahomoj

Суффикс **-end-** выражает необходимость, непереносимость, обязанность (которая должна быть выполнена):

- pagi (платить), pag**enda** (подлежащий оплате);
  - farenda (подлежащий выполнению);
  - solv**enda** problemo (проблема, которая должна быть решена);
  - ating**enda** (подлежащий достижению; atingi - достичь, добраться до; добиться).
- Ĉi tiu libro estas leg**enda** (эту книгу необходимо прочитать)!
- Tio estas far**enda** (это должно быть сделано)!



la mirinda virino

Суффикс **-ebl-** выражает возможность:

- vid**ebla** (видимый); manĝ**ebla** (съедобный);
- sanigi (лечить), sanig**ebla** (излечимый);
- akcepti (принимать), akcept**ebla** laboro (приемлемая работа);
- kompre**neble** (понятно, разумеется (это возможно понять));
- ne**cedeble** (невозможно уступить; cedi - уступить, поддаться);
- neevit**eble** (невозможно избежать, уклониться);
- kredi (верить), nekred**eble** (невероятно, невозможно поверить);
- kunig**ebla** - соединимый, совместимый;
- eble** (возможно); eble li venos (возможно, он придет).



bonega somera vetero

Как правило, с предлогами употребляется именительный падеж, но при указании направления без предлогов или после предлогов **en, sub, sur, super** употребляется винительный падеж. Направление движения в эсперанто выражается с помощью окончания **-n**:

Porko kuras en ĝardeno (свинья бежит в саду). Simio iras en korton <b>n</b> (обезьяна идет во двор).	Profesoro ekzamenas studentojn en klaso (профессор экзаменует студентов в классе).
Kato iradas en la parko (кошка (долго) гуляет в парке). Buso veturas en la arbaron <b>n</b> (автобус едет в лес).	Kemiisto invitis studentojn en la klason <b>n</b> (химик пригласил студентов в класс). Mi veturas en Moskvon <b>n</b> .
Sur la tablo estas lampo (на столе лампа). Sur la tablon <b>n</b> falis kulero (на стол упала ложка).	- Kien vi iras (Куда вы идете)? - Mi iras en la universitaton <b>n</b> .



fungoj en herbo estas

Предлог **en** в подобных предложениях может опускаться:  
Mi veturas Moskvon**n**.

После предлогов **al, ĝis, de, el, tra** винительный падеж не употребляется:  
Lernigisto sendis leteron al urbestro (преподаватель послал письмо мэру).

Предлог **tra** (сквозь, через, насквозь).

Tra fingroj (сквозь пальцы) tra spaco (сквозь пространство) tra surfaco (сквозь поверхность)	trae (насквозь; навывлет) traa (сквозной)
tra kadro (сквозь рамку; окружение) tra ringo (сквозь кольцо; шайбу)	tra <i>i</i> (пройти (насквозь), пересечь (от одного края до другого, от начала до конца))
tra branĉoj (сквозь ветви) tra <i>vivi</i> (пережить)	tra <i>igi</i> (продеть, пропустить (сквозь что-л., через что-л.))



fiherbo



fiinsekto

Наречия, отвечающие на вопрос 'куда?', образуются с помощью окончания **-n**.  
sendi norden**n** aŭ orienten**n** (отправлять на север или на восток);  
parke (в парке); parken**n** (в парк);

korben (в корзину, короб);  
 poten (в горшок);  
 kuven (в таз; ванну; бак; корыто).

**Аккузатив** используется и для обозначения времени (дат), меры.

La duan de aprilo (второго апреля).

Tagon antaŭ tio mi estis en urbo (за день до этого я был в городе).

Ĉiun trian lundon de ĉiu monato mi vizitas teatron (Каждый третий понедельник каждого месяца я посещаю театр).

La pomo pezas cent gramojn (Яблоко весит 100 граммов).

Bonvolu ŝanĝi 100 rublojn (пожалуйста, разменяйте 100 рублей).

Mi havas okcent gramojn da fruktoj (У меня восемьсот граммов фруктов).

*Ĝis la revido, ĉion bonan!*

## Leciono 11

Суффикс **-em-** выражает склонность к чему-либо:

laborema (трудолюбивый)	konsenti - соглашаться,
dormema (сонливый)	kosentema (сговорчивый; покладистый)
kriema (крикливый)	ofendiĝema (обидчивый)
kolerema (гневливый, раздражительный)	pacu (мир, pacema - миролюбивый)
parolema (разговорчивый)	nervema (нервный)
legema (склонный к чтению)	energiema (энергичный)
karesema - ласковый, нежный	emo (склонность, влечение)

Суффикс **-um-** не имеет определенного значения (используется для образования слов, соотносящихся с исходными):

kolo (шея), kolumo (воротник)	necesumi (справлять нужду)
teumi (пить чай)	necesa (необходимый, нужный)
akvumi (поливать)	necesejo (уборная, туалет)
kafumi (пить кофе)	neceseja papero (туалетная бумага)
gusto (вкус), gustumi (отведывать)	butono (пуговица), butonumi (застегивать пуговицу)
malvarmumi (простудиться)	brakumi (обнимать; brako - рука (вся); mano – кисть)
pakumo (упаковка)	kipumi - проводить время вместе; тусоваться.
aerumi (проветривать)	
umo (штука, штукovina, фигovina)	

Предлог **pro** - *из-за* (означает причину).

Pro sociaj problemoj (из-за социальных проблем);

pro malsano (из-за болезни);

pro reklamo (из-за рекламы);

pro humoro (из-за настроения; нрава);

proe = pro tio (из-за этого, поэтому, потому).

Союз **ĉar** (*потому что, так как*).

Mi pensas, ke li estos bona soldato, ĉar li estas forta, saĝa kaj laborema.

Частица **do** - *итак, следовательно, значит, (ну) же* (для усиления при вопросе или приказе);

kial do ne ((ну) почему же нет)?

Kion do vi volegas ((ну) чего же вы хотите)?

Iru do ((ну) идите же)!

Vi, do, konas lin (вы, следовательно, знаете его; koni - знать; быть знакомым с; быть осведомленным в; иметь представление о);

do nun ĉio estas klara (итак, теперь всё ясно).



monujo plena de mono




sukerujo plena de sukero



ruĝa paperejo



bona korto



lerneja klaso



kulero en vitrotaso estas

Kio do li estas (Кто же он)?

Предлог **kontraŭ** (против).

**Kontraŭ la fluo** (против течения);

**kontraŭi** (быть против; быть противоположным; противоречить; противиться; возражать);

**kontraŭaĵo** (противоположность);

**kontraŭiĝi** (стать против; (вос)противиться);

**kontraŭulo** (противник);

**kontraŭstari** (противостоять).

**Mi aĉetis la fromaĝon kontraŭ / por 100 rubloj** (Я купил этот сыр за 100 рублей).



pomo sur branĉo estas

Предлог **krom** (кроме).

**Krom la spiegulo** (кроме зеркала)

**krom la kaĉo** (кроме каши)

**krom mem** (кроме самого; mem – сам)

**kroma** (дополнительный, добавочный)

**krome = krom tio** (кроме того)

**kromaĵo** (дополнение, добавка, вставка)




ringo sur fingro estas

Traduku!

### La feino (фея)

Unu virino havis du filinojn. — La pli maljuna estis tiel simila (похожа, подобна) al la patrino per siaj manieroj (maniero - манера; способ, образ (действия)) kaj vizaĝo (лицо), ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn; ili duope estis tiel malplezuraj (plezura - приятный), ke oni ne povis vivi kun ili. — La pli juna filino, kiu estis simila al sia patro laŭ (по) sia boneco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi (найти). Ĉar ĉiu amas kutime (привычно, обычно) homon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama (то же самое) tempo (время) ŝi havis egan malamon kontraŭ la pli juna. — Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senfine. — Inter (между) aliaj aferoj (дел) tiu ĉi malfeliĉa ido devis du fojojn en ĉiu tago iri al tre fora ejo kaj alporti domon plenan (полную) grandan botelon (бутылку) da akvo.



surfaco

Действительные причастия и деепричастия образуются с помощью суффиксов: **-ant-**, **-int-**, **-ont-**.

**Настоящее время:** faranta - делающий; leganta - читающий; legante - читая;

**прошедшее время:** farinta - делавший; leginta - читавший; leginte - прочитав;

**будущее время:**

faronta - тот, кто будет делать = собирающийся делать;

legonta - тот, кто будет читать;

legonte - когда будет читать.



korbo da fruktoj

Sciencisto, vizitinta nian universitaton (ученый, посетивший наш университет).

Estro, ekzamenonta nian vendejon (начальник, который проверит наш магазин).

Ni parolis iradante (мы разговаривали, гуляя).

Mi vidas lin leganta = mi vidas lin legi = mi vidas, ke li legas (я вижу, что он читает).

От причастий образуются существительные, обозначающие действующее лицо. Для этого используется окончание существительного **-o**:

vizitinto - тот, кто посетил	kritikanto - критик
vizitanto - тот, кто посещает=посетитель	uzanto - пользователь
vizitonto - тот, кто посетит	aganto - деятель; агент (в физике, химии, медицине)
leganto - читатель	kreanto, kreinto - создатель, творец;
esperanto - надеющийся	



kadro



<p><b>Savanto</b> - Спаситель  <b>elektanto</b> - избиратель  <b>suferanto, suferinto</b> - страдалец, мученик  <b>luanto</b> - арендатор, съемщик  <b>konkuranto</b> - конкурент, соперник  <b>variante</b> - вариант  <b>dormanto</b> - спящий  <b>komencanto</b> - начинающий</p>	<p><b>preĝanto</b> - молящийся  <b>plendanto</b> - жалобщик; истец  <b>posedanto</b> - владелец, обладатель  <b>ripozanto</b> - отдыхающий  <b>korespondanto</b> - корреспондент  <b>mendanto, mendinto</b> - заказчик  <b>serĉanto</b> - искатель  <b>laborofininto</b> - закончивший работу  <b>batalanto</b> - воин, борец</p>
--	---




**bonhumora virino**

*Ĝis!*

## Leciono 12

**Предлог dum** (пока, в то время как):

<p><b>dum la vizito</b> (во время визита)  <b>dum la festo</b> (во время праздника)</p>	<p><b>dum la glito</b> (во время скольжения)  <b>dum la ekskurso</b> (во время экскурсии; экскурса)</p>
<p><b>dum la aranĝo</b> (во время мероприятия; обустройства)  <b>dum la spiro</b> (во время дыхания)</p>	<p><b>dume</b> (между тем, тем временем, пока (что), покуда)</p>



**floro en poto estas**

**Предлог trans** (через, за; по другую сторону или в этом направлении):

<p><b>la domo estas trans la rivero</b> (дом находится на другой стороне реки)  <b>trans la supro</b> (через вершину, верх)  <b>trans la rando</b> (через край (чего-либо))  <b>transo</b> (другая сторона)  <b>transe</b> (по ту сторону)  <b>transaĵo</b> (нечто по ту сторону)</p>	<p><b>transsalti</b> (перепрыгнуть)  <b>transigi</b> (перенести, перевезти; перевернуть; преобразовать, превратить)  <b>transigilo</b> (преобразователь, 'передатчик', 'переводчик через что-либо')  <b>transulo</b> (человек с той (с другой) стороны)</p>
---	---



**hundo en kuvo estas**

**Союзы:**


<p><b>ju pli... , des pli ...</b> (чем ..., тем ...)  <b>ju pli interese, des pli bone</b> (чем интереснее, тем лучше)  <b>kvazaŭ</b> (как будто (бы), будто (бы), словно (бы), как если (бы), как бы)  <b>birdo kuŝis kvazaŭ mortinta</b> (птица лежала словно умершая)  <b>nek ... nek ...</b> (ни ... ни...)  <b>nek fiŝo, nek viando</b> (ни рыба ни мясо)</p>	<p><b>sed</b> (но)  <b>amikon esperu, sed senfare ne sidu</b> (на друга надейся, но сам без дела не сиди)  <b>tamen</b> (однако, все-таки)  <b>kvankam</b> (хотя)  <b>kvankam ŝi venis, ŝi tamen restis malkontenta</b> (хотя она и пришла, она все-таки осталась недовольна)</p>
--	---



**ronda butono**

**Приставка ĉef-** (главный; старший (по должности, положению); высший):

<p><b>ĉefurbo</b> (столица)  <b>ĉefo=estro</b> (начальник; руководитель; шеф)  <b>ĉefregulo</b> (главное правило)</p>	<p><b>ĉefe</b> (главным образом; прежде всего (= antaŭ ĉio))  <b>ĉefaĵo</b> (главное, основное)  <b>ĉefeco</b> (главенство, старшинство)</p>
---	--



**kolo kaj kolumo**

**Traduku!**

## La feino (adigo)

En unu tago, kiam ŝi estis apud (около, не вплотную рядом) tiu fonto (источник), venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki. — "Tre volonte, mia bona,"

diris la bela knabino. — Kaj ŝi tuj (тотчас) lavis (помыла; сполоснула) sian botelon kaj plenigis (наполнила) akvon en la plej pura (чистый) ejo de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante (поддерживая) la botelon, por ke la virino povu trinki pli bontaŭge (taŭge - (при)годно, подходяще). — Kiam la bona virino plentrinkiĝis, ŝi diris al la knabino: "Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel verparolanta (vero - правда, истина), ke mi devas fari al vi donacon (подарок)" (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon (форму) de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la boneco de tiu ĉi juna knabino). — "Mi faras al vi donacon," adigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo (рот) eliros aŭ floro aŭ multekosta belŝtono (ŝtono - камень)." Kiam tiu ĉi bela knabino venis domon, ŝia patrino insultis (попырала) ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. — "Pardonu al mi, patrino," diris la malfeliĉa knabino, "ke mi restis (осталась) tiel longe." — Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis (выпрыгнули) el ŝia buŝo tri rozoj kaj tri grandaj multekostaj belŝtonoj. — "Kion mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro. - "Ŝajnas (кажется) al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas rozoj kaj multekostaj belŝtonoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?" (Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino). - La malfeliĉa ido rakontis al ŝi ĉion, kio okazis (произошло, случилось) al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da belŝtonoj. - "Se estas tiel," diris la patrino, "mi devas tien sendi mian filinon. Maria, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi bonege havi tian saman (тот же самый) econ?" Vi devas nur iri al la fonto; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos akvon al ŝi bontaŭge."



paĵoj



brakumo

Страдательные причастия образуются с помощью суффиксов: -at-, -it-, -ot-.

Настоящее время: farata - делаемый;  
 прошедшее время: farita - тот, которого делали; то, что делали;  
 будущее время: farota - тот, которого будут делать; то, что будут делать.


La haveno, vizitita de la estro (гавань, посещённая начальником).  
 La leciono, vizitata de la lernanto (урок, посещаемый учащимся).  
 La kampo, vizitota de la vilaĝano (поле, которое селянин посетит).  
 Vizitite, ĝi malaperis (после того, когда его посетили, оно исчезло).  
 Vizitate, ili laboris (когда их посещали, они работали).  
 Vizitote, ŝi forveturis (когда ее вот-вот собирались посетить, она уехала).



bonega reklamo



kaŝo kaj fromaĝo




feino kun birdo

Vizitito (то, что посетили) ekzamenata (экзаменуемый)	meritata (заслуженный) pruvita (доказанный)
supozata (предполагаемый) trafite! (Попал!; trafi - попасть (в); поразить; встретить случайно; оказаться)	postulata (востребованный, пользующийся спросом) preparita (подготовленный)
promesita (обещанный) ekzerciteco (выучка, (на)тренированность)	premata (угнетенный; premi - (с)жать, давить) presita (напечатанный)
fiksita (фиксированный, прикрепленный; установленный) fleksita (согнутый, изогнутый)	tirata voĉo (протяжный, тягучий голос; tiri - тянуть, тащить, извлекать) kunigita (соединённый, совмещённый)
apartenita (принадлежавший) frotita (тертый, натёртый; бывалый)	ekzamenoto (тот, которого будут экзаменовать). Estimata Irina (Уважаемая Ирина)!

Сложные временные формы используются реже, а образуются они при помощи причастий.

Mi estis vidinta (дословно: в прошлом я был увидевшим (временная форма "прошедшее в прошедшем")).



bela virina vizaĝo

Mi estas manĝanta (я ем).  
 Mi estas manĝonta (я собираюсь поесть).  
 Li estis leganta la libron, kiam mi venis (он читал книгу, когда я пришел).  
 Li estus leganta la libron, se li ĝin jam havas (он читал бы книгу, если бы уже ее имел).  
 Li estas leginta la libron ĵus (он только что прочитал книгу).  
 Mi estas skribanta (я пишу).  
 Mi estas skribinta (я написал).  
 Mi estas skribonta (я собираюсь написать).  
 Mi estis skribanta (я писал (когда...)).  
 Mi estis skribinta (я уже написал (когда...)).  
 Mi estis skribonta (я собрался писать).  
 Mi estus skribinta (я писал бы).  
 Verku! Ĝis!



la Bonegaj Soldatoj



viro estas sur rando

## Leciono 13

Предлог **inter** (между, среди).

<b>inter</b> homoj (среди людей) <b>intera</b> (промежуточный, средний, срединный) <b>interaĵo</b> (промежуточная, средняя часть)	<b>inter</b> e - (по)среди <b>interparoli</b> (беседовать) <b>internacia</b> (международный) <b>ŝanĝi</b> (менять), <b>interŝanĝi</b> (обмениваться).
---	--

Предлог **ekster**=malene (вне).

<b>Ekster</b> la domo (вне дома) <b>ekster</b> la zono (вне зоны, пояса) <b>ekster</b> la ŝtato (вне штата, государства) <b>ekster</b> la paĝo (вне страницы) <b>ekster</b> la tabelo (вне таблицы)	<b>ekster</b> la sistemo (вне системы) <b>ekster</b> la projekto (вне проекта) <b>ekster</b> la leĝo (вне закона) <b>ekstero</b> (внешнее пространство)
---	--

Предлог **laŭ** (по, согласно, вдоль).

<b>Laŭ</b> mia opinio (по моему мнению) <b>laŭa</b> (соответствующий, соответственный) <b>laŭeble</b> (по возможности) <b>laŭmezure</b> (по мере, по размеру, согласно мере, согласно размеру)	<b>laŭiri</b> (идти по, идти вдоль) <b>laŭi</b> (соответствовать (чему-л., кому-л.); быть в соответствии) <b>laŭigi</b> (привести в соответствие, подогнать, адаптировать)
---	--

Предлог **preter** (мимо).

<b>Preteriri</b> (идти мимо) <b>preteratenti</b> (пропустить мимо внимания, не обратить внимания)	<b>pretervole</b> (помимо воли) <b>preteri</b> (миновать)
--	--


Предлог **ĉirkaŭ** (вокруг, около).

<b>La estro</b> havas <b>ĉirkaŭ</b> 40 jarojn (руководителю около сорока лет) <b>ĉirkaŭ</b> la tagmezo (около полудня; mezo - середина)	<b>ĉirkaŭ</b> Suno, Luno, planedo (вокруг Солнца, Луны, планеты) <b>ĉirkaŭi</b> (окружить)
--	---

Traduku!

## La feino (adigo)

"Estus tre bele," respondis la filino malestime, "ke mi iru al la fonto!" — "Mi volas ke vi tien iru," diris la patrino, "kaj iru tuj (тотчас, сразу, сейчас же, немедленно)!" — La filino iris, sed nevolege. — Ŝi prenis la plej belan botelon, kiu estis en la loĝejo. — Arpenaŭ (едва, (как) только, еле) ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe



junulino estas apud pomarbo



fonto de akvo



belulino kuŝas

vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de estrino, por vidi, kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino). — "Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malestima kaj sintrotaksa (tro - слишком, чрезмерно; taksi - оценивать) knabino, "por doni al vi trinki? Certe, mi alportis plej belan botelon speciale (специально) por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki." — "Vi tute (совсем, целиком) ne estas estima," diris la feino sen kolero (гнев, злоба). — "Bone, ĉar vi estas tiel servema (услужлива; servi - служить; прислуживать), mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo serpento." Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis (заметила), ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" — "Jes, patrino", respondis al ŝi la malestimulino, elfetante serpenton. — "Ho (О!), ĉielo (небо)!" ekkriis la patrino, "kion mi vidas? Ŝia fratino en ĉio estas kulpa (виновата); mi pagos (заплатит) al ŝi por tio ĉi!" Kaj ŝi tuj kuris bati (бить) ŝin. La malfeliĉa ido forkuris kaj kaŝis (спрятала) sin en la plej apuda arbaro. La filo de la ĉefego, kiu revenis de ĉaso (охота), ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola (единственный; одинокий) kaj pro kio ŝi malridas. — "Ho ve (ve - увы; Ho ve! - О горе!), sinjoro, mia patrino irigis min for el la domo". La ĉefegido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris iom da multekostaj belŝtonoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. — Ŝi rakontis al li sian tutan historion. — La ĉefegido konsideris (принял в расчёт), ke tia eco havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni donace al alia virino, forkondukis (konduki - вести, приводить) ŝin al la riĉdomo de sia patro, la ĉefego, kie li edziĝis (женился) je ŝi. — Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra (собственная) patrino irigis ŝin for; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte (найдя) neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ (вскоре) mortis en arbaro.

Приведем стихотворение Л.М. Заменгофа "Ho, mia kor!" - "О, мое сердце!" Оно написано после завершения им своего грандиозного труда.

Перевод слов из стихотворения:

trankvila - спокойный; busto - грудь; jam - уже; teni - держать; venki - побеждать; decidi - решать.

В стихотворениях часто окончание 'o' существительных и 'a' у определенного артикля la заменяют апострофом ('), ударение в этом случае падает на последнюю гласную.

### Ho, mia kor'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
 El mia busto nun ne saltu for!  
 Jam teni min ne povas mi facile,  
 Ho, mia kor'!  
 Ho, mia kor'! Post longa laborado  
 Ĉu mi ne venkos en decida hor'!  
 Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
 Ho, mia kor'!

Novaj vortoj:

grio (крупа)	konto (счет; учетная запись)
lipo (губа)	citrono (лимон (плод))
osto (кость)	ĉokolado (шоколад)
modelo (модель; образец)	litro (литр)
etaĝo (этаж); nubo (облако, туча)	ungo (ноготь; коготь)
produkto (продукт)	haŭto (кожа; кожа; корка)

Sufiĉas por hodiaŭ!



virino sidas




virino lavas siajn harojn



belŝtono



ŝi insultas



ŝi estas trinkonta

## Leciono 14

Выучите еще непроеизводные наречия и полезные словечки:

almenaŭ (по крайней мере, по меньшей мере, хотя бы)	preskaŭ (почти) ja (ведь, же) ĵus (только что)	plu (более, больше; дальше, далее) plua (дальнейший) plue ((и) дальше, (и) далее) plui (продолжаться (и) дальше) pluigi (продолжать (дальше))
ankaŭ (также)	ĵusa (только что произошедший)	
ankoraŭ (ещё)	nur (только)	
anstataŭ (вместо)	nura (единственный, один только, простой)	
hieraŭ (вчера)	punkto (точка)	kaj tiel plu (и так далее; сокращенно: ktp или k.t.p.)
malgraŭ (несмотря на; вопреки)	morgaŭ (завтра) pluaĵo (дальнейшее)	

Месяцы (monatoj):

januaro	aprilo	julio	oktobro
februaro	majo	aŭgusto	novembro
marto	junio	septembro	decembro

Legu kaj traduku la tekston!

### La jaro

Tridek tagoj en septembro,  
en april, juni', novembro,  
dudek ok en februaro,  
dudek naŭ en superjaro,  
Restas sep monatoj, kiuj  
havas tridek unu ĉiuj.

Дни недели (sep tagoj):

lundo	merkredo	vendredo	dimanĉo
mardo	ĵaŭdo	sabato	

### Sep tagoj

Lundo, mardo kaj merkredo  
poste ĵaŭdo kaj vendredo,  
sekvas sese la sabato,  
kaj la sepa - la dimanĉo.  
(sekvi - (по)следовать; соблюдать (что-л.)).

Посмотрите, сколько слов можно образовать от одного корня с помощью приставок, суффиксов и окончаний и переведите их!

Sano, sana, sane, sani, sanu, saniga, saneco, sanilo, sanigi, saniĝi, sanejo, sanisto, sanulo, malsano, malsana, malsane, malsani, malsanulo, malsaniga, malsaniĝi, malsaneta, malsanema, malsanulejo, malsanulisto, malsanero, malsaneraro, sanigebla, sanigisto, sanigilo, resanigi, resaniĝanto, sanigilejo, sanigejo, malsanemulo, sanilaro, malsanaro, malsanulido, nesana, malsanado, sanulaĵo, malsaneco, malsanemeco, saniginda, sanilujo, sanigilujo, remalsano, remalsaniĝo, malsanulino, sanigista, sanigilista, sanilista, malsanulista k. t. p.

Legu kaj traduku la faciligitan tekston!



ŝi ekzerciĝas



ŝi ekzameniĝas



bela kaj interesa muro



ŝi frovas siajn okulojn



kato preteriras hundojn

## Gerda malaperis (Герда исчезла, автор Claude Piron)

1. (En universitata manĝejo)

Tom: Saluton, Linda.

Linda: Saluton, Tom.

Tom: Diru al mi: kiu estas tiu?

Linda: Kiu?

Tom: Tiu alta, juna, blankharulo (белокурый парень)...

Linda: Kiu?

Tom: Tiu, kiu sidas en la angulo (угол).

Linda: Ho, tiu!

Tom: Jes, tiu.

Linda: Mi ne scias. Mi ne scias, kiu li estas. Nova studento, verŝajne (вероятно).

Tom: Li estas tute sola.

Linda: Ne. Rigardu. Bela knabino iras al li.

Tom: Ne bela. Juna, eble, sed ne bela. Nur vi estas bela, Linda.

Linda: Tom, kara! Kio okazas al vi? Eble vi laboras tro multe, kaj...

Tom: Nenio speciala (специальный, особенный) okazas al mi. Kaj mi ne laboras tro multe. Fakte, mi laboras malmulte nun. La vera demando estas: kio okazas al vi, Linda? Nur vi estas vere bela.

Linda: Nu, nu...

Tom: Estas fakto. Nur vi estas bela, Linda. Mi estas sincera (искренний). Venu kun mi!

Linda: Sed...

Tom: Venu. Al la granda spegulo. Rigardu. Jen estas Linda, la plej bela virino en la mondo, la plej bela virino en la tuta mondo.

Linda: Kaj jen estas Tom, la plej malserioza knabo en la tuta universitato.

2. Linda: Tom!

Tom: Kio okazas al vi? Vi estas blankvizaĝa! Bela, sed blankvizaĝa.

Linda: Tom! Ne rigardu!

Tom: Kio okazas?

Linda: Strange (странно)! Okazas io stranga, io tre stranga. Tiu ulo, tiu nova studento... Ne, ne, mi petas vin, ne rigardu. Estu diskreta (сдержанный; ненавязчивый, умеренный; дискретный, прерывный).

Tom: Maldie (черт! Dio - бог; возможно это выразить: а́ще)! Diru al mi. Kio estas tiu sekreto (секрет; тайна)?

Linda: Lia mano agas strange. Rigardu, se vi volas, sed plej diskrete.

Turnu (поверни) vin iomete (немного), eble, sed tute nature (естественно).

Li ne vidu, ke vi rigardas al li.

Tom: Vi pravas (ты права). Io stranga okazas. Dum ŝi ne rigardas al li –

ŝi nun rigardas al la granda spegulo – lia mano iom post iom

(понемногу; постепенно), tre tre malrapide (медленно), apudiĝas al ŝia taso...

Linda: Estas io en lia mano.

Tom: Mi ne vidas. Li estas tro fora (далёкий). Maldie! Tiu alta forta knabo nun staras inter ili kaj mi. Mi ne plu vidas.

Linda: Sed mi vidas. Mi vidas bone. Mi vidas tre bone. Mi vidas tute bone. Ej!

Tom: Kio okazas?

Linda: Ŝi rigardas al li nun, kaj lia mano haltas (остановилась).

Tom: Kaj kio plu? Diru al mi!

Linda: Nun li parolas al ŝi. Li montras al la pordo (дверь).

Tom: Eble li volas, ke ŝi rigardu al alia direkto (направление), ke ŝi ne plu rigardu al li.

Linda: Prave (правильно), tute prave. Jen ŝi rigardas al la pordo. Li plu parolas kaj parolas. Dum ŝi ne rigardas al lia direkto, lia mano plu apudiĝas al la taso. Ej!

Tom: Kio? Kio okazas?


Linda: Lia mano revenas, tute diskrete, kvazaŭ tute nature.



kato kaŝiĝas




ŝi koleras



li montras kiel kaj kien bati



ŝi premas lian bruston



Suno kaj nuboj en ĉielo estas



Ĉu li ne volegas edziĝi?

Tom: Ĉu estas io en lia mano?  
 Linda: Nenio plu. Sed tute certe nun estas io en ŝia taso.

3. Bob: Maldie! Kio okazas? Vi vidiĝas kiel kaŝesploristoj (*kaŝe* – скрытно; *esplori* - исследовать, изучать; расследовать). Ĉu mi povas sidi kun vi?  
 Linda: Saluton, Bob.  
 Tom: Bonan tagon, Bob.  
 Bob: Bonan tagon, Linda. Bonan tagon, Tom. Pardonu, ke mi ne salutis vin tuj.  
 Linda: Ne gravas (*grava* - важный). Nun vi salutis, kaj ni pardonas vin.  
 Bob: Ĉu vi permesas (позволите, разрешите), ke mi sidu ĉe via tablo?  
 Linda: Komprenoble, vi sidu kun ni.  
 Bob: Mi tamen ne volas esti maldiskreta. Eble Tom parolas pri amo kaj preferas (предпочитает) esti sola kun vi.  
 Tom: Mi ne parolis pri amo.  
 Linda: Li nur diris, ke mi estas la plej bela virino en la tuta mondo.  
 Bob: Li pravas. Tio ne estas amdiro, tio estas facila fakto.  
 Tom: Prave. Facila fakto.  
 Bob: Nu, certe, Linda estas tre bela, sed ne tio gravas (важно) nun.  
 Linda: Ne gravas, ĉu? Ne gravas, ke mi estas bela, ĉu? Jen bela aserto (утверждение)!  
 Bob: Pardonu min. Mi volas diri, ke io estas pli grava.  
 Tom: Kio? Pri kio vi parolas? Kio estas pli grava? Vi ne vidis min, dum mi apudiĝas al vi, sed mi vin rigardis.  
 Linda: Mi ne komprenas, pri kio vi parolas.  
 Bob: Mi parolas pri via vizaĝo.  
 Linda: Kio pri mia vizaĝo? Ĉu ĝi ne estas bela?  
 Bob: Ho jes, ĝi estas bela, ĝi estas la plej bela en la mondo. Sed ĝi estis stranga!  
 Linda: Stranga? Ĉu mia vizaĝo estis stranga?  
 Bob: Jes. Via vizaĝo estis stranga. Fakte, viaj vizaĝoj estis strangaj. Stranga vizaĝo de kaŝesploristino kaj stranga vizaĝo de kaŝesploristo. Vi vidiĝis strange. Mi bone rigardis vin, dum mi apudiĝis al vi, kaj estis stranga vidaĵo de via vizaĝo, Linda, kaj ankaŭ via, Tom. Kiel mi jam diris, vi vidiĝis kiel kaŝesploristoj.

### Leciono 15

Всю грамматику курса Вы уже изучили. Осталось выучить последние 90 корней и закрепить полученные знания на практике, дочитав учебный детектив (выбор был неслучайный, поскольку для него есть и аудиофайлы, и художественный фильм, в котором 98% слов будут Вам известны).

Novaj vortoj:

ruli (катить; исполнять программу)	profito (выгода, прибыль) signo (знак)	sonĝo (сон, грезы, мечта)
vana (напрасный)	partio (партия, сторона (в политике; споре; игре; браке))	dependi (зависеть)
spuro (след, отпечаток)		efektiva (действительный, действующий, эффективный)

4. Bob: Diru al mi sincere, pri kio vi parolis.  
 Tom: Ni parolis pri tiu ulo.  
 Bob: Kiu ulo?  
 Tom: Tiu viro ĉe la angulo. Tiu juna viro.  
 Bob: Pri kiu vi parolas? Ĉu pri tiu blankharulo, kiu sidas kun Gerda?  
 Linda: Gerda! Vi do scias, ke ŝia nomo estas Gerda! Vi do konas ŝin!  
 Bob: Nu, mi ne vere konas ŝin. Mi scias, kiu ŝi estas. Tio estas alia afero (дело; вещь).



ankaŭ hundo servas




ŝi ne estas sola



li estas trankvila



La Venko



flankoj k anguloj de rektangula triangulo

Linda: Kiu do ŝi estas?

Bob: Sed vi ne respondis al mi. Vi ne respondis al mia demando. Ĉu vere pri tiu blankaharulo vi parolis?

Tom: Jes. Pri li.

Bob: Mi ne konas lin. Mi neniam vidis lin antaŭe.

Linda: Sed, diru al mi, kiu estas tiu Gerda?

Bob: Ŝi venis por lernigi. Temas pri la arto kompreni, pri kio temas sekreta mesaĝo. Fakte, ŝia fako estas la malnovaj sekretaj lingvoj.

Tom: Mi ne komprenas. Kiu, en universitato, volas lerni pri la malnovaj sekretaj lingvoj?

Bob: Ankaŭ mi ne tute komprenas. Estis ideo (идея) de Ronga, la profesoro pri lingvoscienco. Li konsideras, ke sekretaj lingvoj estas speco (разновидность; вид; род; сорт) de la arto informarlati (rilatas - относиться, иметь отношение), kaj ke ili do rilatas al lingvoscienco.

Linda: Eble jes. Eble li pravas. Kaj tamen tiu ideo estas iom stranga, ĉu vi ne konsentas?

Bob: Jes. Ĝi vidiĝis strange ankaŭ al mi, kiam oni parolis pri ĝi.

Linda: Eble Ronga, la lingvosciencia profesoro, nur volegis, ke bela virino kunlaboru kun li. Ĉu ne estas bona ideo kunlabori kun bela knabino, kiam tio estas ebla?

Tom: Mi jam diris al vi, ke ŝi ne estas bela. Nur vi estas bela.

Bob: Mi ne konsentas. Estas fakto, ke Linda estas tre bela, ke ŝi estas la plej bela knabino en la mondo. Sed ankaŭ Gerda estas bela, iom malpli bela, sed tamen bela; ĉu vi konsentas?

Tom: Tute ne. Por vi, eble. Sed por mi ne. Por mi, nur Linda ekzistas (существует) kiel bela virino.

Bob: Ĉu vi volas diri, ke por vi Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo?

Tom: Jes, por mi, Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo.

Bob: Maldie! Vi verŝajne amas ŝin.

5. Bob: Nu, vi ankoraŭ ne diris al mi, kio okazis, dum vi kaŝe rigardis tiun duopon.

Linda: Okazis io vere stranga.

Tom: Vere stranga, fakte. En la mano de tiu junulo estis io.

Bob: Kio?

Linda: Ni ne povis vidi. Io tre eta. Malgranda afero (вещь; точнее было бы: substanco - вещество; субстанция; сущность или аĵо - вещь). Afereto.

Tom: Kaj dum ŝi ne rigardis, lia mano (al)apudiĝis al ŝia taso.

Linda: Kaj kiam ŝi ekrigardis lin, lia mano ekhaltis.

Tom: Tiam li montris ion al ŝi. Memkompreneble, li volegis forturni ŝian atenton.

Linda: Kaj li sukcesis. Li plene sukcesis. Ŝi rigardis al la pordo. Kaj dum ŝi rigardis for, lia mano subite (внезапно, неожиданно, вдруг) estis super ŝia taso, dum unu momento, ne pli, kaj tute nature revenis. Malplena.

Bob: Ĉu ĝi estis plena antaŭe?

Tom: Ne plena. Kompreneble, ĝi ne estis plena. Sed estis io en ĝi, kaj post kiam ĝi estis dum momento super la taso de Gerda, estis plu nenio en ĝi.

Linda: Certe estas iu substanco.

Tom: Iu sanigilo.

Bob: Kiel vi povas scii, ke ne estis tute facile erego da sukero?

Linda: Li ne agus tiel kaŝe, se estus nur sukero.

Tom: Krome, ĉi tie ne estas erega sukero. Estas nur pulvora (порошковый) sukero, en sukerojoj.

Bob: Eble li havis suker/er/eg/on en la poŝo (карман) kaj...

Tom: Ĉu vi ofte iradas kun sukereregoj en via poŝo?

Bob: Vi pravas. Tiu ideo estas sensenca. Tamen...

Linda: Rigardu! Jen ŝi ekstaras, kaj ekiras for.

Bob: Ŝi ŝajnas tute normala. Verŝajne vi pensis ion malbonan, dum temas pri tute facila, tute natura okazaĵo.

6. Tom: Ĉu vi aŭdis? Kio estis tio?



belaj manoj, ungoj kaj haŭto



citrono kaj ĉokolado



ili interparolas



virino dormanta kun libro




Bob: Jes, mi aŭdis. Mi aŭdis ion.  
 Linda: Ankaŭ mi aŭdis strangan bruon, kvazaŭ iu falus en la trairejo (проход, коридор).  
 Bob: Kvazaŭ ŝi falus.  
 Tom: Mi havis la saman penson kiel vi. Ankaŭ mi pensis tion. Ankaŭ mi pensis: jen Gerda falas en la trairejo.  
 Linda: Ĉu ni iru vidi?  
 Tom: Kompreneble. Ni iru tuj.  
 Bob: Mi iru kun Tom, sed vi restu ĉi tie, Linda. Rigardu tiun junulon, kun kiu Gerda parolis, kaj kiu eble metis sanigilo en ŝian kafon.  
 Linda: Ĉu vi duope foriras kaj mi restu tute sola? Mi iom timas.  
 Bob: Ni ne havas la tempon interparoli. Ni devas iri vidi tuj. Restu trankvile ĉi tie. Vi estas en sendanĝero (danĝero - опасность). Venu, Tom, ni ne maltrovu tempon.

#### 7. (En la trairejo)

Tom: Jen ŝi estas. Ni pravis. Ŝi apenaŭ havis la tempon alveni ĝis la angulo, jam ŝi falis. Videble, ŝi estas senkonscia (konscii - (о)сознавать). Ŝi maltrovis la konscion kaj falis.  
 Bob: Ĉu ŝi ankoraŭ vivas?  
 Tom: Jes. Ne timu. Ŝi maltrovis la konscion, sed ŝi ne maltrovis la vivon. La koro batas. Ĝi batas malforte, sed tamen batas. Ŝi do vivas. Eble ŝi apenaŭ vivas, sed ŝi vivas.  
 Bob: Kion ni faru?  
 Tom: Kion vi opinias?  
 Bob: Ŝajnas, ke ŝi dormas.  
 Tom: Ni devas informi la estr/ar/an/ojn. Tuj. Mi iros. Ili eble decidus voki sanigiston, kaj almenaŭ tuj sendos zorgistaron (zorgi - заботиться (о); нянчиться с, ухаживать за; точнее: san/ig/ant/in/on). Certe estas zorgistino en ĉi tiu universitato, ĉu ne?  
 Bob: Verŝajne, sed mi ne scias certe. Mi estas ĉi tie apenaŭ sep tagojn.  
 Tom: Nu, mi tuj iros informi ilin. Restu ĉi tie kun ŝi. Sed ni unue metu ŝin pli bone, ke ŝi kuŝu kun la piedoj pli altaj ol la kapo.  
 Bob: Ĉu vere? Ĉu vere vi volas, ke ŝi kuŝu kun la piedoj pli altaj ol la kapo? Tio ne estas bona.  
 Tom: Tamen, kiam iu maltrovis la konscion, tio estas la preciza pied/trov/iĝo, se mi bone memoras, kion oni lernigis al mi.

8. En la universitata memserva manĝejo, Linda sidas kaj pensas. Ŝi pensas ne tre trankvile. Fakte, ŝiaj pensoj iĝas pli kaj pli maltrankvilaj. Ŝi rigardas la junan viron, kiu metis ion en la kafon de Gerda. Ŝi pli kaj pli maltrankviliĝas. Tom kaj Bob estas for jam longe. Ili ne revenas. Ĉu do vere okazis io al Gerda? Sed kio okazis? Ĉu io grava? Linda rigardas la junulon kaj pensas: "Kion mi faros, se li ekstaros kaj foriros? Ĉu mi sekvos lin? Ĉu mi sekvu lin?" "Kion mi faru, se li iros eksteren? Ĉu mi sekvu lin eksteren? Ĉu mi sekvu lin ekstere? Mi ne scias, kion mi faru. Mi ne scias, kion mi faros. Mi ne scias, ĉu mi sekvos lin aŭ ne. Kaj se li foriros en aŭto? Ĉu ankaŭ mi sekvu lin aŭte? Jam estas vespero. Baldaŭ venos nokto. Jes. Baldaŭ noktiĝos. Ĉu mi sekvu lin nokte? Kaj eĉ se li ne iros eksteren de la universitato, eĉ se li restos ĉi tie, ĉu mi sekvu lin? Se li eliros tra tiu ĉi pordo, li iros en la trairejon al iu ĉambro. Ĉu mi sekvu lin en la trairejon? Ĉu mi sekvu lin en la trairejo? Ĉu mi sekvu lin en la ĉambro, en kiun li eniros? Ne. Neeble. Mi atentos en la trairejo. Sed se nenio okazos? Se li restos longe plu en la ĉambro? Kaj se li eliros tra tiu pordo, li iros eksteren, verŝajne al la urbo. Ĉu mi sekvu lin al la urbo? Ĉu mi sekvu lin en la urbon? Ĉu mi sekvu lin en la urbo? "Se li iros piede, eble li vidos min, verŝajne li vidos min. Li komprenos, ke mi lin sekvas. Li turnos sin al mi. Mi ektimos. Mi blankiĝos kaj tuj poste ruĝiĝos. Ĉiaokaze, mi maltrankviliĝos. Jam nun mi maltrankviliĝas. Se li iros per buso, li eĉ pli certe vidos, ke mi sekvas lin, ĉar ni devos kune atendi ĉe




junulino kun speguleto



kuleroj plenaj de grioj



buŝo, lipoj, dentoj



ĝi kulpas



interesa pordo

la haltejo." Linda ne sukcesas decidi, kion ŝi faru. Ŝi timas. Ŝia koro batas rapide. Ŝi volus, ke Tom kaj Bob estu kun ŝi, ke ili helpu ŝin, ke ili helpu ŝin decidi. Ŝi estas tute sola. Ŝi sentas (чувствовала), ke ŝia koro rapidiĝas, sed ŝi ne scias, kion fari. Kaj jen, antaŭ ol ŝi povis decidi, antaŭ ol ŝi sukcesis retranskribiĝi, jen la juna viro ekstaras. Li rigardas al la traireja pordo. Ĉu tien li iros? Li rigardas al la pordo, tra kiu oni eliras al la urbo. Ĉu tien? Jes, tien li iras. Kaj Linda tuj ekstaras kaj ekiras al la sama pordo. Ne ŝi decidis. Ŝajnas, ke ŝia korpo decidis mem. Ŝajnas, ke ŝiaj piedoj agas mem. Nu, ĉiaokaze, jen Linda sekvas lin.



stranga k mirinda ŝtono

## Leciono 16


Novaj vortoj:

benzino (бензин) imposto (налог, сбор)	kruco (крест) fadeno (нить)	serio (серия; ряд; последовательность) distanco (расстояние, дальность)
lango (язык; защелка)	kulturo (культура)	ligo (связь, союз)
kranio (кран трубопроводный)	nivelo (уровень)	amplekso (объем, размер)



hundo kaj ostoj

9. "Ŝi kuŝas meze de la trairejo! Venu, venu tuj. Certe la afero urĝas (urĝa - tuja, malplilongiga (afero))," diras Tom. Li rigardas la zorgistino: ŝi estas dika, grasa (жирный; тучный; полный (о ком-л.); жировой) virino kun bluj okuloj, ruĝaj haroj, kaj tre ronda vizaĝo. Jam iomajn minutojn li provas (испытать, проверить, (по)пробовать) diri, kio okazis, sed ŝajnas, ke tiu zorgistino ne rapide komprenas. La vorto "urĝa" ŝajnas ne ekzisti en ŝia vortaro. "Kuŝas, ĉu? Meze de la trairejo, ĉu vere?" ŝi diras. Videble, la zorgistino apenaŭ povas kredi. "Kial, maldie, ŝi kuŝas meze de la trairejo?" ŝi demandas. "Mi petas, venu urĝe. Mi ne scias, kial ŝi kuŝas tie. Mi nur diras, kion mi vidis. Ni trovis ŝin tie. Eble ŝi estis malsana. Mi ne scias. Ŝi maltrovis la konscion. Nun certe oni devas urĝe okupiĝi pri ŝi."



ĝi estas gravega

"Stranga afero!"

"Nu, mi ne estas fakulo (fako - отдел, отделение (ящика, стола, шкафа, учреждения); отсек; цех; специальность; раздел, область, отрасль (науки, культуры, промышленности)). Vi jes. Okupiĝi pri malsanaj homoj estas via fako, ĉu ne? Venu tuj. Urĝas!"

"Nu, nu, nu, nu. Kial, maldie, ŝi maltrovis la konscion en la trairejo? Stranga ideo! Oni neniam maltrovas la konscion tie."

"Ĉu vere? Kie do oni maltrovas la konscion en ĉi tiu universitato? Pardonu min, sed mi ne konas la tradiciojn. Mi estas novulo. Apenaŭ sep tagojn mi estas ĉi tie."

"Juna viro, en ĉi tiu universitato, oni maltrovas la konscion en la klasĉambroj, oni maltrovas la konscion en la manĝejo, oni maltrovas la konscion en la dorm-ĉambroj, oni maltrovas la konscion en la lavejoj, eble eĉ oni povus maltrovi la konscion en iu estrara oficejo (офис, учреждение; ofico - должность, служба). Sed pri la traireja mal/trovkonscio mi neniam aŭdis. Stranga nuntempo! Stranga junularo! Oni faras ion ajn niatempem."

"Vi parolas, parolas, paroladas, kaj dume tiu kunsentinda knabino kuŝas en la trairejo, kaj neniu zorgas pri ŝi!"

"Nu, nu, ne maltranskribiĝu, juna viro, ne havu zorgojn. Ni tuj rapidos tien, kaj mi tuj prizorgos ŝin."

Kaj ili kune rapidas al la ejo, kie Tom lasis (lasi - оставить; покинуть; (от)пустить) sian amikon kun Gerda. Sed jen subite Tom haltas.

"Kio okazas? Kial vi ekhaltis?" demandas la zorgistino.

"Ŝi estis ĉi tie, kaj ne plu estas, sed..."

"Sed estas iu alia, kaj li estas senkonscia, ŝajnas al mi. Ĉu vi konas lin?"

"Jes, estas mia amiko Bob. Kio okazis al li?"

La zorgistino iras al Bob, kiu falsidas ĉe la traireja muro. Ŝi tuŝas lian kapon.

"Batita! Oni batis la kapon al li!"

"Maldie! Bob, Bob! Respondu! Ĉu vi aŭdas min? Diru ion, mi petas! Kio okazis?"



viro rulas kovrilon de rado



substanco



spuro de bato

Sed Bob ne respondas, kaj Tom iĝas pli kaj pli maltrankvila.

10. Fakte, Tom ne estas ema kredi la zorgistinon. Kial? Ĉu vi scias, kara amiko, vi kiu sekvas ĉi tiujn interokazaĵojn (событиями) ekde la unua vorto? Ĉu vi scias, kial Tom ne emas kredi la zorgistinon? Ne. Certe vi ne scias. Ankaŭ mi ne scias. Sed fakto restas fakto, eĉ se ni ne komprenas ĝin. Kaj la fakto estas, ke Tom ne emas ŝin kredi. Tom estas agema knabo kaj eble tiu tro parolema zorgistino ne ŝajnas al li kredinda. Eble li opinias, ke tiu zorgistino tro emas paroli, kaj do ne estas kredinda. Aŭ ĉu temas pri io alia? Tom ege ŝatas sian amikon Bob. Li ŝategas lin. Li lin amas, fakte. Bob kaj li amikiĝis antaŭ longe en la urbego, kie ili vivis tiutempe – ili dumtempe eĉ iradis al la sama lernejo – sed poste Tom devis iri al malsama urbo, kaj ili ne plu vidis sin reciproke (взаимно, обоудно). Kiam, antaŭ iomaj tagoj, ili retrovis unu la alian en la sama universitato kaj ege dankis la okazon. Ili treege ŝatas la tiean bonegan vivon. Ili ŝategas ĝin. Duopo estas agemaj, laboremaj knaboj, kun speciala ŝato al la iom timemaj studentinoj. Eble ĉar timema junulino estas malpli timinda ol ino neniam ema timi, ol sen/tim/ulino. Ĉu vi komprenas? Sed nun Tom sin demandas, kial li sentas tiun zorgistinon nekredinda. Li preferus malparoleman, grava/vidiĝan sinjorinon. Tiu ĉi ne vidiĝas tre zorgeme, kaj li ne trovas ŝin atentema pri liaj demandoj. Verdire, li opinias ŝin ema fifari sian laboron. Li timas, ke ŝi ofte agas fifare. Fifaremaj homoj ekzistas en la mondo. Kial tiu tro parolema zorgistino ne estus unu el ili? Ĉu li misis, kiam li turnis sin al ŝi? Sed al kiu alia li povus sin turni? Ŝi estis la sola zorgistino, kiu troviĝis en la universitato. Aŭ ĉu li mispensas? Kaj nun li sentas sin ema zorgi pri Linda. Ĉu tiu belega knabino ne troviĝas en danĝero? Li amas ŝin, li eĉ amegas ŝin, pli kaj pli, kaj la ideo, ke danĝeraj homoj povus fari ion al ŝi, apenaŭ estas travivebla. La vivo ne estas facila, kaj ŝajnas nun, ke la tuta afero iĝas pli kaj pli malŝatinda.

11. Linda ekhavis ideon. Ŝi aliris la junan blankaharulan viron, dum li apudiĝis al sia aŭto, kaj alparolis lin: "Sinjoro, ĉu vi bonvolus helpi al mi?" Li turnis sin al ŝi kun vizaĝo ŝajne ne tre kontenta, kaj ŝin rigardis dum longa senvorta minuto. "Kiel mi povus vin helpi?" li fine demandis, kaj li tuj aldonis: "Bonvolu pardoni min, se mi respondas nee, sed al mi tempo vere malsufiĉas. Mi devas urĝe veturi al la urbo." "Precize tiel vi povas min helpi. Mia aŭto mallaboras. Io estas fifarita en ĝi. Mi ne sukcesas ĝin irigi..." "Pardonu min, sed mi ne sukcesus rebonigi la aferon, eĉ kun plej granda bonvolo. Pri aŭtoaranĝaĵo (устройство автомобиля) mi scias nenion. Mi ĉiam miras vidi, ke veturiloj entute funkcias. Kiam mi vidas maŝinon, ĉiam mirigas min, ke tia ŝajne senorda aranĝo de eroj kaj objektoj (объектов) iĝas aŭton iri. Mi..." "Mi ne petas vin ripari (чинить; исправлять) mian veturilon, vi min miskomprenis." La ideo de Linda estis jena: sekvi lin estus danĝere, sed se li veturos aŭte, mi petos lin akcepti, ke mi veturu kun li, kaj dum la veturado mi igos lin paroli. Mi diskrete faros ŝajne kutimaj demandojn, kaj paroligos lin. Tiel mi scios kiel eble plej multe pri li. "Nu, bone," li fine konsentas. "Konsentite, venu." Kaj li malfermas la pordon de la aŭto por ŝi. "Dankon, vi vere estas tre helpema. Tio ege helpas min. Mi plej sincere dankas." "Ne dankinde," li respondas, iom seke. Kaj li ekirigas la aŭton. "Mi ne ŝatas la ideon, ke mi devos venigi ripariston, maŝiniston," ŝi diras. "Mi tute ne ŝatas aŭtojn, fakte. Mi havas veturilon, sed mi ne ŝatas aŭtojn." La alta junulo nur malparolas. "Ne estas facile igi lin diri ion," pensas Linda, iom zorge, sin demandante, ĉu estis saĝe enigi sin en tiun fiaferon. Ŝi forte volegas lin paroligi, sed samtempe timas malkontentigi lin. Neniam estas facile trovi plene kontentigan manieron agi. "Ĉu maltrankviligas vin, se mi parolas?" ŝi demandas, "vi eble estas malparolema." "Mi havas zorgojn," li respondas.



mirinda sonĝo



stranga signo



poŝa horloĝo



simio zorgas pri hundido



signo de eco

"Mi ne volas maltrankviligi vin. Estas jam tiel bonkore, ke vi min veturigas. Mi vere sentas grandegan dankemon al vi."  
 "Ne dankinde," li ripetas, kaj malparolas plu, pripensema.

## Leciono 17

Novaj vortoj:

rango (rang, чин, звание, степень, разряд) funkcio (функция) kalsono (кальсоны, панталоны (нижние)) kalsoneto (плавки, трусики)	plasto (пластмасса; пластик) tramo (трамвай) bero (ягода) rado (колесо)	televido (телевидение) printempo (весна) normala (нормальный, обычный) organo (орган)
--	--	--

12. Bob duone malfermas la okulojn, ilin refermas, ilin malfermetas denove, ilin refermas, doloraŭdiĝas, kaj finfine malfermas ilin tute larĝe.

"Donu al mi ion por trinki," li diras.

"Trinki? Kion vi volegas trinki?" demandas Tom.

"Ion ajn. Alkoholon (алкоголь). Donu al mi tason da alkoholo."

"Kiel vi sentas vin?" diras la zorgistino Marta.

"La kapo doloras," Bob respondas doloraŭdiĝe. "Mi petas vin, bonvolu doni al mi ion por trinki."

"Ĉu vi bonvolas iri," Tom petas la zorgistinon, "kaj alporti al li tason da alkoholo?"

La zorgistino iom nedecidas, sed fine kapjesas.

"Ĉu mi ankaŭ voku la policon?" ŝi diras. "Li ja ricevis baton, baton sufiĉe fortan, por ke li iĝu senkonscia. Laŭ mia opinio, tio pravigas, ke oni venigu la policon. Ĉu vi ne konsentas?"

"Ankaŭ akvon," diras Bob, antaŭ ol Tom trovas la tempon respondi al Marta.

"Mi tre volegas trinki. Mi trinkos alkoholon plezure, sed unue mi trinku akvon.

Bonvolu alporti al mi tre grandan tason da akvo kaj iom grandan tason da alkoholo."

"Jes. Estus saĝe voki la policon," Tom respondas al la zorgistino.

"Se vi ne alportos al mi ion por trinki, mi iros mem," diras Bob. "Mi tre volegas trinki. Vi ne povas pensevidi (вообразить), kiom mi volegas trinki. Mi tuj iros trinki akvon. Kaj poste mi iros aĉeti alkoholon. Ĉu oni povas ricevi alkoholon en la memserva manĝejo?"

"Ne, tute ne," Marta respondas, "sed mi havas alkoholon en mia ĉambro.

Mi alportos ĝin al vi. Aŭ venu mem, se vi povas. Ĉu vi povas stariĝi?"

"Mi povas," diras Bob, tre malrapide stariĝante kun la helpo de Tom kaj de la zorgistino, "kvankam dolore."

Ili iras al ŝia ĉambro.

"Trinku tiom da akvo, kiom vi volegas," ŝi diras. "Kaj poste mi donos alkoholon al vi. Eksidu sur tiun seĝon, ĝi estas tre bontaŭga, vi vidos."

Bob sidiĝas sur la seĝon, iom doloraŭdiĝas, kaj ricevas grandan tason da akvo kun videble grandega plezuro. "Doloras al mi la kapo," li diras.

"Diru," petas Tom, "kio okazis. Ĉu finfine vi klarigos al ni? Ni estas ege scivolaj (любопытны)."

Bob pripensas iomete, trinkas iom da akvo, metas la manon al la kapo kun dolora esprimo (выражение) survizaĝe, kaj fine respondas:

"Mi ne povus klarigi. Nenio estas klara. Mi estis tie apud Gerda. Mi

aŭdis nenion, mi aŭdis neniun bruon (шума). Kaj subite ĉio eksplodis (взорвалось) en mia kapo kaj mi mortis."


13. La vojo ŝajnas longa, kiam oni malparolas la tutan tempon. Linda estas parolema; krome, ŝi volegas ricevi informojn pri sia stranga kunulo; ŝi do tute ne ŝatas tiun longan malparoladon. Kial ne provi denove? Ŝi decidas, ke ŝi rekomencos paroli. Se li ne ŝatos, nu, li esprimos sian malŝaton, kaj ili plu



koro



Kruco; signo de vivo, senmorteco; ŝlosilo de kaŝa scio



kato trinkas el krano per lango



Diino kun fadeno

veturos senvorte, kaj la vojo plu ŝajnos longega.

"Vi diris...", ŝi komencas, ne sciante, kiel ŝi finos, sed feliĉe ideo tuj venas:

"Vi diris, ke vi havas zorgojn. Nu, ofte oni sentas sin pli bone, kiam oni esprimas siajn zorgojn al iu."

"Vi estas scivolema, ĉu ne? Nu, mi ne volas esti malbonmaniera kun tiel bela knabino, kiel vi. Pardonu, se mi ne montras min pli amikiĝema. Sed miajn zorgojn mi ne povas klarigi."

"Ĉu vi estas certa? Oni ofte pensevidas, ke afero estas neebla, ĉar oni ne scias, kiel komenci, sed..."

"Ne. Kiom rilatas al mi, ne estas tiel. Mi ne povas rakonti pri miaj zorgoj, ĉar ili rilatas al homojn, pri kiuj mi ne rajtas paroli. Oni devas esti diskreta, ĉu ne? Ĉu vi ŝatus, ke viaj amikoj rakontu ĉion pri vi al nekonato?"

"Kompreneble ne. Mi bone komprenas vin. Fakte, mi ne estas speciale scivola. Mi komencis diri tion nur, ĉar mi trovis la malparolon peza kaj la vojon pli kaj pli longa. Sed mi tute ne volus maldiskreti."

"Estas fakto, ke oni kutime interparolas, kiam oni veturas kune. Mi verŝajne ne estis tre ĝentila, lasante tiun malparolon adi kaj pli kaj pli peze por vi. Mi eĉ ne rimarkis, ke malparolo estiĝas kaj adas. Mi estis plena de miaj pensoj, de miaj zorgoj, kaj ankaŭ de la vojo. Oni devas atenti la vojon, kiam oni aŭtadas, ĉu ne? Strange, kvankam vi estas tre bela kaj sidas tuj apud mi, plej apude al mi, mi tamen forgesis pri vi. Nur ekzistis por mi la vojo en miaj okuloj, kaj la zorgoj en mia kapo."

"Ĉe mi okazis la malo. Mi ade pensis pri vi. Mi rimarkis, ke vi ne vidiĝas tre ĝoje. Vi ŝajnis malfeliĉa. Mi min demandis, ĉu mi povus helpi. Vi ja tre helpeme konsentis min veturigi. Mi sentas min danka. Mi volus redoni al vi saman servon. Mi opiniis, ke se mi helpas vin vortigi vian malĝojon, tio eble senpezigos vin, kaj mi estos kontenta agi helpe. Eble estas malsaĝe, sed mi ĉiam volegas feliĉigi la homojn."

"Vere, vi estas tre bonkora. Mi ege bedaŭras, ke mi ne povas jesi al via propono. Sed, kiel mi jam diris, miaj zorgoj rilatas al aferojn, pri kiuj mi ne rajtas rakonti. Nu, jen ni alvenas. Kie vi volegas, ke mi lasu vin?"

"Kien precize vi iras? Kie vi haltos? Kie vi lasos la aŭton? Vi povus lasi min tie. Estos plej facile por vi."

"Ĉiam scivola, ĉu ne? Vi ŝatus scii, kien mi iras," li diras ridante, dum Linda sentas sin ruĝiĝi, ĉar tian rimarkon ŝi tute ne atendis. Dum momento, ŝi ne scias, kiel respondi. Ŝi sentas sin malsaĝa.

"Tute ne," ŝi fine diras, malvere. "Kien vi iras, tio tute ne interesas min. Mi proponis tion nur, ĉar tio ŝajnis plej facila. Sed se maltrankvilas vin, ke mi scios, vi povas lasi min ie ajn en la centro (центр). Ekzemple ĉe la Internacia Hotelo, aŭ ĉe la Granda Teatro. Ĉiaokaze, mi treege dankas vin kaj mi facile trovos mian vojon. Jen. Tie ĉi estas bonege. Koran dankon, kaj ĝis revido, kara sinjoro."

"Ĝis revido, kara kaŝesploristino!"

La aŭto forveturas, kaj Linda ne povas forturni la okulojn de ĝi. Kara kaŝesploristino, vere! Kion li volis diri? Ĉu li pensis vere pri tio? Nia kunsentinda Linda ne scias, kion pensi.

14. "Kie maldie mi troviĝas?" diris al si Gerda, kiam ŝi vekigis. Ŝi kuŝis sur lito – sur malbona, tro mallarĝa lito – en ĉambro nekonata, en domo nekonata. Malsufiĉis al ŝi forto, kaj ŝia tuta korpo iom doloris; ŝi estis laca (усталый, утомлённый), kvazaŭ ŝi estus laborinta multajn horojn sinsekve en la kampoj, kvazaŭ ŝi estus movinta pezajn ŝtonojn dum multaj kaj multaj tagoj, sen eĉ horo da dormo, kvazaŭ ŝi estus irinta dum multaj monatoj sur malfacila monta vojeto. Unuvorte, ŝi estis lacega, kaj ŝajnis al ŝi, ke ŝia korpo plendas pri troa laboro, nehome peza, nehome malfacila, nehome laciga. Kaj tamen ŝi sciis, ke ŝi faris nenium korpan laboron; ŝi sentis sin malĝoja; ŝiaj okuloj malsekiĝis; ŝi malridis. Ne estis multe da lumo en la ĉambro. Kvankam ŝi sentis sin tiel laca, tiel senforta, scivolo pri la ĉi/ejo (этом месте) tamen superis ŝian volegon plu kuŝi. Ŝi sekigis siajn okulojn kaj ellitiĝis. Ŝi iris al la eta fenestro, esperante malfermi



buso sur haltejo



forlasita domo



nivelilo de akvo



ligaĵo da branĉetaro



virino riparas aŭton

la dikajn fenestrokovrilojn, kiuj malhelpis la envenon de lumo. Ŝi ankaŭ esperis, ke ŝi vidos la sunon. Krome, estis tre varme en la ĉambro, kaj estus saĝe malfermi la fenestron por enlasi iom da pura aero. Sed ŝi ne sukcesis. Io malhelpis, ke tiu malnova fenestro moviĝu. Ŝi iris al la pordo; ĝi estis ŝlosita, kaj ŝlosilo nenie videblis. La ĉambro estis malbela, ne tre pura. Apud la muro staris tablo kaj seĝo. Ŝi sidiĝis sur la seĝon, metis la brakojn sur la tablon, la kapon en la manojn, kaj malridis. "Enŝlosita mi estas," ŝi pensis. "Oni enŝlosis min!" Antaŭe ŝi ne multe pensis pri la plezuro esti libera. Liberi estis io ege natura: ŝi iris, kien ŝi volegis, sen iu ajn malhelpo, kaj tiu libereco ŝajnis rajto memkomprenebla. Kaj nun oni malliberigis ŝin malantaŭ ŝlosita pordo. Ŝi, kiu tiom ŝatis ĝoji, ridi, kanti, kiu tiom ŝatis ludi kaj iradi sub la suno, nun ne plu trovis en si la ŝercemecon, kiu tiom ofte helpis ŝin en la malfacilaj horoj de la vivo. Ŝi ne povis vidi la eksteran sunon, kaj same en ŝia koro ne plu lumis la kutima suno de ĝojo. Kaj jen subite ŝi reagis: ŝi iris al la pordo kaj ĝin batis kun plej granda forto; ŝi faris timigan bruon, sed nenio okazis. Ŝi vokis pli kaj pli laŭte (громко), kriis, kriegis, samtempe piedbatante la pordon, sed venis neniu respondo, neniu reago. Senespera, ŝi revenis al la lito kaj rekuŝiĝis, pli laca ol iam ajn. Dum multaj horoj ŝi restis tiel, kuŝe, kaj fine, tro laca, ŝi ekdormis. Vekis ŝin ida voĉo; ĝi venis el iu alia ĉambro, en la sama domo, tute certe; ĝi diris: "Neniam diru nek al via patro nek al via patrino, ke ni venis en la forlasitan domon. Estas malpermesite ludi ĉi tie. Se ili scius..." Alia voĉeto respondis: "Mi neniam diros. Nek al mia patro, nek al mia patrino. Ne havu zorgojn. Neniam oni scios, ke ni venis ludi ĉi tie." Gerda diris: "Idoj, ĉu vi aŭdas min?" Ŝia koro batis espere. "Iu parolis," sonis unu el la idvoĉoj, sed aŭdeble la knabo ne parolis al Gerda, nur al sia kunulo. "Ĉu vi aŭdis?" "Estis kvazaŭ voĉo de virino," diris la alia. "Idoj, venu, helpu min, mi estas mallibera, oni ŝlosis la pordon, mi estas enŝlosita, venu, mi petas, mi petegas, liberigu min," Gerda plu petegis. Sed la reago de la idoj estis plej timiga. "Venu!" kriis unu. "Estas ne/ekzist/ul/o!" "Vi pravas," la dua respondis, "oni ĉiam rakontis pri neekzistulo en ĉi tiu forlasita domo. Neekzistulino, oni diris, kaj la voĉo estis ina. Ni rapide forkuru!" "Mi timas," ankoraŭ diris la unua, dum la bruoj klarigis al Gerda, ke la du knaboj forkuras kaj lasas ŝin sola, sola, sola...

## Leciono 18

15. "Bonan matenon, ho plej bela, ĉu vi bone dormis?"  
 "Bonan matenon, Tom. Mi ne dormis tre multe. Kaj vi, ĉu vi dormis kontentige?"  
 "Bonege, kara, bonege. Sed diru do al via plej kredinda amiko, kial vi ne sufiĉe dormis."  
 "Ĉu ne estas klare al vi? Mi tro pensis. Mi pensadis tutnokte pri ĉio, kio okazis hieraŭ."  
 "Estas fakto, ke mi ne revidis vin hieraŭ, post kiam mi eliris kun Bob por okupiĝi pri Gerda. Ni lasis vin en la memserva manĝejo kun la tasko (задача) kaŝesplori la blankaharulon. Kiam mi revenis, vi estis for. Kien vi iris? Ĉu vi rakontos al mi pri via agado?"  
 "Kun plezuro, sed ankaŭ vi rakontos al mi pri via agado poste, ĉu ne? Nu, mi veturis al la urbocentro kun tiu junulo. Mi rakontis al li, ke io fifara okazis al mia aŭto, kaj mi petis lin min veturigi. Li variis (колебался; varia - различающийся; переменчивый, переменный), sed fine decidis jese. Mi volegis lin paroligi, por ekscii pri li kiel eble plej multe, sed mi ne sukcesis. Ni diris unu al la alia nur tre kutimajn aferojn."  
 "Ĉu vi almenaŭ scias, kien li iris en la urbo, laŭ kiuj stratoj, al kiu domo?"  
 "Atendu. Mi rakontos ĉion. Por ke mia peto ŝajnu natura, mi petis lin lasi min en la centro. Li lasis min ĉe la dekstra flanko de la Granda Teatro, kaj li veturis plu. Mi ne sciis, kion fari. Mi iradis en la urbo, pensante, ke mia ideo ne estis tiel bona: mi eksciis nenion pri li, kaj troviĝis sen aŭto en la mezo de la urbo. Fakte, mi sentis min iom malsaĝa. Mi iradis de strato al strato, provante elpensi planon, kaj jen subite mi vidas lin eliri el la poŝtoficejo. Mi estis nekredeble bonŝanca



plasta manĝilaro



novega tramo



beroj en telero estas



bona televidilo



scivola besto

(ŝanco - шанс, случай, удача; вероятность, возможность). Pensevidu! Se mi estus troviĝinta naz-al-naze kun li precize kiam li eliris el la poŝt-oficejo...! Sed mi vidis lin sufiĉe frue por min kaŝi."

"Feliĉe, ke vi vidis lin sufiĉe frue!"

"Kiel mi diris: mi estis bonŝanca, mi vidis lin precizatempe. Nu, li iris piede, kaj mi decidis lin sekvi. Ĉu vi konas tiun grandan vendejon, kiu vendas kvardek malsamajn specojn de pano kaj ĉiaspecajn ĉokoladojn kaj aliajn dolĉaĵojn? Sur la maldekstra flanko de la strato, kiu iras al la Ĉefa Sportocentro. Estas granda vendejo de mebloj apude. Nu, ne gravas, ĉu vi konas aŭ ne. Li eniris tiun panejon, aŭ tiun dolĉaĵvendejon, aŭ tiun... nu... tiun pan- kaj dolĉaĵvendejon, kaj eliris post minuto portante paperan sakon, kiu vidiĝis plenplena. Ŝajnis, ke li aĉetis la tutan vendejon. Mi devas diri, ke ili vendas tre bonajn aĵojn en tiu ejo. Mi, kiu tiom ŝatas ĉokoladon kaj dolĉaĵojn, ofte irus tien kaj aĉetus multon, se mi ne timus dikiĝi. Nu...e... kion mi rakontis?"

"Vi rakontis pri via kaŝesplora sekvado, sed vi devojiĝis de la ĉefa vojo de via rakonto al flankaj konsideroj pri pano kaj ĉokolado. Fakte, ĉu vi volegas iom pli da pano? Kion vi trinkas ĉi-matene (в это утро)? Teon, mi vidas. Ĉu vi ŝatus, ke mi replenigu vian tason?"

"Jes, dankon. Mi plezure trinkos plian tason da teo. Dankon, Tom, kara. Nu, do..."

16. "Kie mi estis en mia rakonto? Ha jes! Mi memoras. Li eliris el tiu vendejo kun papera sako plena je dolĉaĵoj."

"Eble estis ĉefe pano."

"Prave, eble pano. Ĉiaokaze, jen mi ekvidis lian aŭton, kiu staris flanke de la strato. Mi pensis: nun li forveturos aŭte, kaj mi ne plu povos sekvi lin. Sed ne. Li nur iris porti tiun sakon al la aŭto, ĝin metis en ĝin, reŝosis la aŭtopordon, kaj plu piediris. Nur tiam mi havis la ideon skribi la numeron (номер) de lia aŭta numerplato (plata - плоский; ровный, гладкий). Mi do eksekvis lin plu. Li iris sur la dekstra flanko de la strato, kaj mi sekvis iom fore sur la maldekstra flanko."

"Ĉu li rimarkis, ke vi lin sekvas?"

"Certe ne. Subite, li eniris bonegamanĝejon. Mi variis: ĉu ankaŭ mi eniru? Aŭ ĉu mi tro ŝancos, ke li vidos kaj rekonos min? Unuflanke, mi volestis kaŝesplori lin. Aliflanke, la ŝanco, ke li rekonos min, estis reala (реальный, действительный, вещественный), kaj min maltrankvilis. Dum mi staris tie decidovarie, eniris la bonegamanĝejon aro da soldatoj, eble ok aŭ naŭ, junaj viroj, kiuj servis, videble. Dum ili eniris kaj la pordo estis malfermita, mi vidis, ke la bonegamanĝejo estas granda kaj plena je homoj. Mi sekvis la ok aŭ naŭ soldatojn kaj trovis sidejon ne tre videblan de la ejo, kie mia blankaharulo ĵus eksidis."


"Li do estas via blankaharulo, ĉu?"

"Ne parolu malsaĝe. Vi bonege scias, kion mi volas diri. Estis la bonegamanĝejo kun stranga muziko kaj strangaj vestaĵoj. La servantoj estis vestitaj per t.n. (=tiel nomataj) naciaj vestoj multkoloraj. Mi manĝis bonegan flu/aĵ/manĝ/aĵ/on (жидкая еда; суп), sed poste ion, pri kio mi ankoraŭ nun min demandas, ĉu estis eroj el hundo aŭ kato. Certe ne estis kokidaĵo, sed krom tio mi havas neniun certecon. Ankaŭ la kresk/aĵ/manĝaĵo (салат) estis tre bona, sed la kuko (сладкие: пирог, булка, кекс) estis treege dolĉa, tro dolĉa por mi, kaj same la kafo; ĝi estis nekredeble plena je sukero, kaj mi manĝis tiom da kafpulvoro, kiom mi trinkis da kafo."

"Mi miras pri la grava ejo, kiun konsideroj pri manĝo kaj trinko okupas en via kaŝ/esplora/rakonto, kaj mi atendis interesajn novaĵojn."

"Ne ridu pri mi, aŭ mi ne adigos la rakonton. Okazis io. Du el la soldatoj estis koleraĵ, ĉar la servanto ne volis porti al ili alkoholon. Ili faris bruegon, kriegis, kriaĉis, la aliaj provis ilin malparoligi, kaj finfine speco de malpaco (paco - мир; покой) komenciĝis inter ili. Ili ekbatis unu la alian kun rimarkinda forto. Subite, jen unu telero flugis tra la aero, poste du, tri, kvar, kvin aliaj teleroj, unu taso eĉ flugis ĝis la malplanko ..."

"Kia ĝojo! Kia plezuro! Kiajn bonegajn amikojn vi trovis!"



printempaj floroj



esprimo de dubo sur ŝia vizaĝo



precize en la centro de la celo



ĝi estas grandampleksa

"Ĉefe, kia bruo! Ŝajnis, ke ili rompas mil tasojn samtempe, dum cent viroj kune kriaĉas, kaj dek muzikistoj provas kune superi la bruon de la telera malpaco."

"Tre bela okazaĵo, ĉu ne? Mi gratulas vin. Estis kuraĝe (kuraĝa - смелый, храбрый) resti tie."

"Jes. Kia vivo! Krome, mi estas kuraĝa, ĉu vi neniam rimarkis?"

"Mi ne konas vin sufiĉe, sed via kuraĝo ne mirigas min. Bela, kuraĝa, bonkora: vi estas la bonega virino. Sed pri via bonegeco ni havos aliajn okazajn paroli. Kio okazis post la telera, tasa kaj kafa malpaco?"

"Mi rimarkis tre bedaŭrindan aferon, nome, ke la blankaharulo ne plu troviĝas en la bonegamanĝejo. Li certe foriris, dum mi tiom interesiĝis pri la intersoldata malpaco. Mi vere bedaŭras mian kaŝesploro. Sed kion fari? Bedaŭri ne helpas, mi fifaris mian taskon. Mi provos ne fifari ĝin alifoje."

"Nu, prave, estas tre bedaŭrinda afero. Eĉ se nur ĉar ĝi montras, ke vi tamen ne estas plene bonega. Sed mi almenaŭ ĝojas pri unu afero: vi fakte ne tiom interesiĝis pri via blankaharulo. Do eble vi pravas, eble li ne estas via blankaharulo, eble vi tamen preferas vian karan amikon Tom."

"Eble, eble. Sed ĉu vi vere scias, kial mi fortunis miajn okulojn de tiu blankaharulo, kvankam mi antaŭe decidis plej multe informiĝi pri li?"

"Nu, verŝajne ĉar..."

"Ĉar unu el tiuj junaj soldatoj estis tiel bela viro!"

17. "Sed kial, kial, kial?" diris la policano preskaŭ krie al sia edzino, kiu estis lia plej helpema kunlaboranto. "Diru al mi kial, kaj mi solvos la problemon. Oni ne kaptas homon por la facila plezuro travivi fiaferon! Ŝi ne estas riĉa. Ne kun la espero ricevi monon ili ŝin kaptis. Ŝi ĉiam vivis plej trankvilan, honestan vivon. Do, ne ĉar ŝi aliĝis al iu malleĝa agado ili ŝin kaptis. Pro kio do? Por kio?"

"Ŝi lernigas, vi diris al mi. Kion do ŝi lernigas? Kio estas ŝia fako?"

"Ŝi lernigas historion, sed ŝi estas specialisto pri la sekretaj lingvoj de la deksepa kaj dekoka jarcentoj."

"Pro tio verŝajne ŝi malaperis, sed ni ne trovos la kialon (причину) uzante nur nian pensevidon. Ni prefere uzu la faktojn. Ni provu kunmeti ilin, rekunmeti la sinsekvon de la okazaĵoj. Kiel la afero komenciĝis?"

"Ni ne scias multon. Mi rakontu jene. Du gestudentoj – Tom kaj Linda – rimarkis, ke alta blankaharulo metas ion en la tason de Gerda. Ili rimarkis depro lia kaŝa, ŝtela maniero agi. Iom poste, Gerda eliras el la memserva manĝejo tra la pordo traireja. Tuj poste aŭdiĝas bruo, kvazaŭ iu falus. Bob, kiu aliĝis al Tom kaj Linda intertempe, eliras kune kun Tom. Ili trovas Gerdan en la trairejo: ŝi kuŝas senkonscia. Tom foriras serĉe al helpo, dum Bob gardas

la junan profesorinon. Kiam Tom revenas kun la zorgistino, Gerda malaperis, sed ĉi-foje Bob estas senkonscia, batita al-kape. Intertempe la blankaharulo eliris tra la alia pordo de la memserva manĝejo, kaj sekvis Linda. Ŝi sukcesas kunveturi en lia aŭto, sed ne sukcesas igi lin diri ion.

"Ĉu la aŭto estis lia? Ĉu ne estis ŝtelita veturilo?"

"Ne. Verŝajne li ne pensis, ke iu ekscios ion. Kiam ŝi petis, ke li veturigu ŝin, li malŝatis tion, sed li verŝajne opiniis, ke estos strange malakcepti ŝin."

"Vi do scias, kiu li estas, ĉu ne?"

"Jes, ni ekzamenis. Estas la frato de Marta, unu el la universitataj zorgistinoj, tiu, kiun Tom venigis."

"Interese! Plej interese! La gefratoj eble kunlaboras en iu fiagado. Kion ili respondas al via demandado pri tiuj strangaj okazaĵoj?"

"La zorgistino nur rediras la samon, kiel Tom. Kaj la blankaharulon ni ankoraŭ ne pridemandis."

"Kial?"

"Por ke li ne pensu, ke ni konas pri li. Li estas nia sola ŝanco trovi Gerdan. Bedaŭrinde, en la lastaj tagoj, li vivas plej normalan vivon, iris al neniuj speciala ejo, faris nenion atentindan. Eble li faris sian fiaferon kaj ĝin finis. La aliaj – tiuj, kiuj forkuris kun Gerda, kiam Bob, kiu gardis ŝin, estis senkonsciigita – certe estas la gravuloj. Ili devas ekzisti, ĉar nek la alta



kato estas en danĝero



numero sep



vitrotaso da lakto kaj kuketoj



simio lacas



blankaharulo, nek lia fratino Marta povis forporti Gerdan. Se estos memkomprenebla, ke la tasko de la blankaharulo estis nur faligi ian dormigan substancon en la trinkaĵon de Gerda, ni lin pridemandos. Ni ĝis nun esperis, ke li kondukos nin al la malaperinta belulino. Sed pli kaj pli ŝajnas, ke tio ne okazos.

## Leciono 19

18. "Vi ne ŝatas vian fiekzistado, ĉu? Vi volegas ŝanĝi ĝin, ĉu ne? Nu, estas facile ŝanĝi vian fiekzistadon. Vi ŝatus manĝi ion, ĉu ne? Eregon da pano vi volegas, tute certe. Aŭ ĉu frukton? Jen, rigardu, mi havas pomon kaj oranĝon (апельсин) por vi. Kiel belaj ili estas! Plenaj je suko (сок), kompreneble. Se vi estus konsentinta labori por ni, vi jam estus plene manĝinta. Kaj jen io alia: kuko. Ĉu ne bonega, belega, manĝinda kuko? Ankoraŭ varma, ĵus kuirita. Tuŝu, sentu mem, kiel varmeta ĝi estas. Vi volegas manĝi nur pro via malsaĝeco. Se vi estus saĝa, vi konsentus fari la etan laboron, kiun mi petas de vi, kaj vi tuj ricevus la manĝaĵojn. Mi bedaŭras, ke vi estas tiel malsaĝa. Estas bedaŭrinde, vidi tiel belan knabinon suferi pro malesto de manĝaĵo. Mi sincere bedaŭras vian malsaĝecon. Nur eta "jes", kaj ĉio ĉi estos via."

Li ŝajnigas sin helpema, sed estas io tre aĉa en lia vizaĝa esprimo. Gerda sentas sin pli kaj pli malforta. Estas varme en ĉi tiu ĉambraĉo, kio ne estas facile elportebla. Krome, ŝi volegas manĝi, kaj la vido de tiu pomo kaj de tiu oranĝo estas vere suferiga. Kaj tamen ŝia devo estas diri "ne".

"Ĉu vi legis la dokumenton, ĉu vi komprenis ĝin?" li aldonas, kvazaŭ espere. Kompreneble ŝi legis: ŝi estis scivola. Almenaŭ ŝi bezonis (нуждалась, имела потребность) scii, kial oni ŝin kaptis kaj senigis je libereco. Tial ŝi legis. Estis malfacile kompreni, komence, sed iom post iom ŝia memoro plene revenis, ŝi rememoris la principojn (принципы) de tiu sekreta lingvo, kaj ŝi sukcesis kompreni ĉion; ŝi havis nenion alian por fari. Dum multaj horoj ŝi estis sola kun tiu dokumento, kiun ili lasis al ŝi. Sed ŝi decidis neniam respondi al ili; ŝi ja antaŭ longe promesis al Profesoro Kosadi, ke pri tio ŝi ĉiam malparolos. Neniam ŝi ŝanĝos sian decidon.

"Ĉu vi legis la dokumenton?" sonas duan fojon la aĉa voĉo.

Ŝi plu malparolas, kaj li eliras, kolerega. Li eliras kun la pano, la pomo, la oranĝo kaj la kuko. Feliĉe, ke almenaŭ ili lasis al ŝi akvon, varmaĉan akvon, jes ja, apenaŭ trinkeblan, sed tamen akvo. Maleston de manĝaĵo eblas pli malpli elporti, sed maleston de akvo ne. Minutoj preteras. Multaj minutoj. Unu horo, du horoj, ĉu tri horoj? Ĉu multaj horoj? Kiel scii? Ne estas horloĝo sur la muro, kaj ili prenis ŝian brakhorloĝon. La lumo apenaŭ ŝanĝiĝas en la ĉambro, pro la nmoveblaj fenestro-kovriloj. Ĉu estas frue, ĉu estas malfrue, ŝi tute ne povas scii. Tago, nokto, mateno, vespero ĉi tie estas samaj. Sunlumo neniam envenas. Kaj jen la aĉulo revenas, kun aŭdaskribilo. Li irigas aŭdaskribaĵo. Eta, plenda malridema voĉeto aŭdiĝas, kaj romp/tuŝas la koron de Gerda:

"Patrino, patrineto mia, mi petegas vin. Faru, kion ili volas. Ili kaptis min.

Mi ne scias, kie mi estas. Estas malbonege. Mi timas. Mi tiom volegas reiri nian domen. Mi petegas vin, faru tion, kion ili volegas. Se ne, ili faros malbonon al mi. Ili ne diris, kion. Ili ne volas diri. Sed mi scias, mi sentas, ke estos malbonege. Kunsentu min, kara, kara patrino. Kunsentu vian filinon.

Mi timegas. Rapidu, rapidu, ke plej frue ili liberigu min. Ili ne volas, ke mi parolu pli longe, sed mi havas paperon kaj skribilon, kaj mi tuj skribos leteron al vi.

Mi nur petegas: faru tion, kion ili volegas!"

"Jen la letero," li kriaĉas, kaj post ridaĉo li aldonas:

"Nu, tio verŝajne sufiĉos. Mi revenos post iom da tempo. Mi estas certa, ke vi iĝos saĝa, finfine. Kaj jen. Prenu ĉi tion, ĝi helpas vin pensadi."

Kaj tion dirante, li ĵetas al ŝi belegan pomon. Gerda sentas sin, kvazaŭ Eva ĉe l' serpento.

19. Petro: Eble ni forkuris tro rapide. Ĉu vere neekzistuloj ekzistas? Ralf: Ĉu vi volas rakonti pri la voĉo al viaj gepatroj? Se jes, vi ne plu estas mia amiko. Se ili



signoj de danĝeroj



fervoja bileto



kampo, plataejo



fluaĵmanĝaĵo



oranĝoj sur branĉo estas

scios, ke ni ludis en la malpermesita domaĉo, vi...

Petro: Ne. Mi tute ne volas diri al la gepatroj, ke ni ludis tie. Tio estas nia sekreto. Mi nur v...

Ralf: Jes. Sekreto kunigas la amikojn. Se vi gardos la sekreton, vi restos mia amiko. Sed se vi malkaŝos ĝin al granduloj, mi... mi... mi suferigos vin, mi igos vin malridi tiel grave, ke neniam plu en via tuta vivo vi malmemoros tiun tagon. Kredu min, en via tuta vivo, tio estos la lasta fojo, kiam vi rompīs promeson. Kio? Ĉu tio igas vin ridi?

Petro: Mi ne ridas, mi nur v...

Ralf: Ankaŭ mi ne ridas. Mi parolas plej serioze. Oni ne ridas pri veraj danĝeroj, ĉu? Kaj se vi...

Petro: Sed mi tute ne volas diri ion al la gepatroj. Mi nur...

Ralf: Kaj se vi rakontos ĝin en la lernejo, ne estos pli bone por vi. Mi malridigos vin tute same. Mi malpurigos viajn vestojn, kaj via patrino krios kolere kiam vi revenos vian domen. Mi kuŝigos vin en akvo kaj sidos sur via kapo. Mi kaptos vin per mia speciala kaptilo kaj veturigos vin en la montaron kaj forlasos vin tie, kaj vi estos tute sola kaj maltrovita, kaj vi malridos. Vi...

Petro: Vi eĉ ne scias aŭtadi. Mi ne kredas je via kaptilo. Kaj krome, mi nur...

Ralf: Jes, mi scias aŭtadi.

Petro: Vi ne rajtas aŭtadi ĉar vi estas tro juna. Kaj vi ne havas aŭton.

Ralf: Mi ne zorgas pri tio, ĉu mi rajtas aŭ ne. Se mi farus nur tion, kion mi rajtas fari, mi farus nenion. Mi ŝtelos iun veturilon, jes, mi ŝtelos veturilon de iu lernigisto en la lernejo kaj veturigos vin sur monton kaj lasos vin tie kaj vi malridos. Se vi parolos al iu el niaj samklasanoj aŭ samlernejanoj, la tuta lernejo ekscios pri la virino el la malnova domaĉo, kaj poste la gepatroj...

Petro: Vi diris "virino", do vi ne kredas, ke estas neekzistulo. Vi do konsentas, ke...

Ralf: Kompreneble mi ne kredas je neekzistuloj. La virino, kiun ni aŭdis, estas virino, kiun mi kaptis kaj gardas tie. Mi planas igi ŝin mia servistino: ŝi faros ĉion, kion mi volos. Kaj se vi parolos pri ŝi... Nu, mi ne volas paroli pri tio, kio okazos al vi, ĉar vi tro timus...

20. Ireroj (шаги). Oni iras sur la strato. Gerda aŭskultas atente; ŝi antaŭsentas, ke io grava baldaŭ okazos. Bruo de multaj homoj. Ili venas. Ili ŝajnas multaj, I aŭ la bruo: ĉu nun oni venos are por ŝin suferigi? Ŝlosiloj. Bruo de ŝlosiloj trans la pordo. Iu enmetas ŝlosilon en la fermilon (замок). Ŝi scias, ke ne estas ŝia kutima vizitanto. Li ne agas tiel. Li enmetas tre rapide la ŝlosilon, ĝin turnas, eniras. Ne ĉi tiu. Li provas unu fojon. Ne sukcesas. Plia bruo de ŝlosiloj. Alian fojon li provas, sen pli da sukceso. Li provas ree kaj ree per malsamaj ŝlosiloj. Aŭdeblas, ke li ne konas la fermilon. Kiam li enmetis ŝlosilon, li tenas ĝin laŭ malsamaj direktoj, kvazaŭ li ludus per ĝi, verŝajne ĉar li esploras nekonatan fermilon. Kaj jen li fine sukcesas! Li eniras.

"Polico!" li diras, kaj Gerda devas superi fortan emon salti al li por lin kisi (поцеловать). Estas alta viro, maldika, kun malblankaj haroj kaj verdaj okuloj, kiu sin tenas tre inde. Post li venas aliaj homoj, multe pli junaj. Ŝi jam vidis tiujn vizaĝojn. Studentoj ili estas. Ilia sinteno estas tute malsama: libera.

"Tiuĝeĝunuloj multe helpis min," la policano klarigas. "Ni ne estas sufiĉe multaj en la polico por ĉion fari, kaj ilia helpo estis tre bonvena (желанный, приятный, долгожданный (о госте); Bonvenon! - Добро пожаловать!)"

Kaj li prezentas (представить, предложить; (по)знакомить) ilin: Tom, Bob, Linda. Kiam ŝi aŭdis la irerojn, Gerda pensvidis, ke venas sep, ok, eble naŭ homoj, sed almenaŭ ses; fakte, ili estas nur kvar.

"Mia filino...?" ŝi demandas, kaj ŝi apenaŭ povas eligi la du vortojn, tiom ŝi timas la respondon.

"Savita: ŝi nun estas en via domo, kun via edzo. Viaj kaptintoj estas malprofesiuloj, kiuj agis fifare. La etulino estis ĉe la onklino de Marta, la universitata zorgistino. Ni facile trovis ŝin. Ŝi tre ĝojis revidi la patron, kaj sia domon, kompreneble."

"Ho, mi dankas, mi dankegas vin. Via diro ŝanĝas mian tutan vivon. Sed diru: kiel vi alvenis ĉi tien? Kiel vi malkovris, ke ili tenas min en ŝlosita en ĉi tiu domaĉo?"




**katido estas kuraĝa**




**grava aranĝo**



**insulo en maro estas**



**sanktulino**



**li kisas ŝin**

"Du knaboj rakontis pri voĉo en ĉi tiu malnova, forlasita domo. Dank' al (благодаря) ili... Sed nun rakontu vi. Kion viaj kaptintoj celas? Kio estas ilia celo? Kial vin teni mallibera?"

"Ili volas, ke mi traduku malnovan dokumenton. Mi malkonsentis. Tiam ili opiniis, ke perforte ili sukcesos. Ili preskaŭ sukcesis. Per malesto de manĝaĵo, unue, kaj poste per la aŭdinformo de mia filino. La malesto de manĝaĵo ne estis facile elportebla, kredo min, sed la aŭdaskribaĵo...! Fakte mi ege volas manĝi nun. Mi petas, ĉu iu el vi bonvolus iri aĉeti manĝaĵon por mi? Io ajn estos bonvena." Linda foriras por aĉeti manĝaĵojn.

"Vi rakontos al mi, ĉion," ŝi diras al la du knaboj elirante.

Gerda rakontas pri la dokumento; ŝi tenas ĝin enmane kaj tradukas, vorton post vorto; krome, ŝi donas ĉiujn necesajn klarigojn. La policano kapjesas komprene. Gerda klarigas al li ankoraŭ pli pri la kondiĉoj de sia mallibereco. Kaj jen la policano havas ideon.

"Bob, ĉu vi konsentus kaŝi vin sub la lito, se iu envenus?"

"Kial?"

"Mi havas planon. Mi ŝatus, ke ni ĉiuj foriru, krom vi kaj Gerda, kaj ke ŝi diru al la kaptinto, ke ŝi konsentas klarigi al li, kio estas skribita sur tiu papero, mi volas diri: sur tiu malnova dokumento. Ili tiam agos laŭ la dokumento, kaj ni kaptos ilin tiom pli facile. Sed tamen, ni ne rajtas fiŝanci, ke Gerda suferu. Kiu scias? Kiam ŝi ne plu estos necesa por ili, ili povus... Nu, vi komprenas. Vi restos ĉi tie, kaj kiam vi aŭdos irerojn apudiĝi, vi kaŝos vin sub la lito, kaj bone atentos ĉion, kio okazas. Gerda diris, ke ĉiam venas nur unu homo, unu viro, maldika ulo, ne tre forta. Fortulo kiel vi tuj superos lin, se necese."

Bob konsentas, kvankam, se diri la veron, kun iom duba (сомнительный) esprimo.

21. Gerda sentas sin pli bone. Ŝi ĵus finis manĝi. Foriris Linda, Tom kaj la policano. Ŝi parolas kun Bob, tre mallaŭte. Ili ja devas atenti, ĉu iu apudiĝas aŭ ne. Feliĉe, eĉ sen speciale aŭskulti, ŝi ĉiam bone aŭdis, sufiĉe frue, kiam la aĉulo venas. Ŝi ŝatas Bobon. Li estas granda kaj forta, kun esprimo de bonkora, sindonema hundo. Ili parolas pri siaj vivoj, pri la lastaj okazaĵoj. Kiam ŝi parolas pri sia edzo, lia vizaĝo ŝanĝiĝas, alprenas iom malĝojan esprimon. Ĉu li enamiĝus al ŝi? Kaj jen aŭdiĝas ireroj. Bob saltas sub la liton. "Ne brui," li diras al si, "plej grave, plej necese estas ne brui!" Envenas la gardanto, la aĉa malgrasulo, kiu, per siaj vortoj pri manĝo, tiom suferigis Gerdan. Sed ĉi-foje ŝi povos kontentigi lin. Kia plezuro!

"Mi konsentas," krias Gerda, kiam la maldika aĉulo malfermas la pordon. "Mi akceptas vian proponon. Mi ne plu elportas. Mi tradukos vian aĉan paperon. Liberigu mian filinon, kaj donu al mi manĝi, mi petas."

"Jen," facile diras la maldikuleto, kaj li elprenas el sako panon, kukon, fruktojn, ĉokoladon, kaj eĉ botelon da lakto (молоко). Gerda manĝas malparole; ŝi povus manĝi eĉ pli, kvankam ŝi ĵus iom manĝis. Bob, aŭdante la manĝobruon, pli kaj pli volegas manĝi, sed kion li povus fari?

"Nu, bonvolu klarigi al mi, kio estas skribita sur tiu malnova papero," la vizitanto diras. Kaj Gerda klarigas. Ŝi rakontas, ke temas pri la riĉaĵo de la Lumoserĉantoj. La Lumoserĉantoj estis sekreta societo, kiu naskiĝis en la dekkvina jarcento kaj adis, jen (то) forta, jen (то) malforta, laŭ la tempoj, ĝis la mezo de la dekoka jarcento. Ĝi havis anojn en tre multaj landoj, en nacioj plej malsamaj. Multaj malsamaj homoj estis anoj de tiu internacia aŭ supernacia societo. Ilia celo estis sekrete labori por la unuigo de la mondo, de la hom/ar/er/oj, por ke la malsamaj tradicioj interkompreniĝu. Ili estis althomecaj kaj elstaraj saĝuloj. Ili estis elpensintaj sekretan lingvon, kiu ebligis al ili interparoli, el kiu ajn lando aŭ homarero ili estis. La ŝtatoj, kiam ili malkovris la ekziston de la Lumoserĉantoj, ektimis tiujn homojn, miskomprenis iliajn celojn, kaj ilin atakadis. Inter la Lumoserĉantoj, tre riĉaj homoj troviĝis. Tial, laŭ malsamaj malnovaj dokumentoj, ilia riĉaĵo estas multvalora (valoro - ценность, стоимость, значение; величина). Tiu ĉi papero estas fotokopio (kopii - (с)копировать; переписывать) de dokumento, kiu tre precize montras, kie oni kaŝis la riĉaĵon. Gerda klarigas, tradukas, kaj la viro skribas ĉion sur etan kajeron. Kiam ŝi finis, li diras:

"Dankon. Nun ni havas, kion ni volegis. Mi foriras. Mi lasas vin tie ĉi. Ni decidis poste, kion ni faros el vi. Ĝis, belulino, ĝis."

Nur post kiam la pordo fermiĝis kaj la bruo de la ireroj finis, aŭdiĝas de sub la lito voĉo, kiu diras: "Ĉu vi lasis al mi iom de tiu kuko?"

## Leciono 20

22. Baldaŭ venis la policanoj, por ilin liberigi. Gerda reiris sian domon, al siaj filino kaj edzo. Sed Bob rapidis al la flughaveno. Li volis ĉeesti kun Linda kaj Tom, kiam la policano malliberigos la kaptintojn de Gerda. Estis sufiĉe multekosta veturado, sed la familio de Gerda – riĉa familio – pagis por ili la bileton (билет), tiel esprimante sian dankemon. Ĉar la policano kaj la gejunuloj sciis pli frue ol la ŝtelistoj, kie troviĝas la riĉaĵo, ili havis multe da tempo por prepari sin. Ili ne dubis, ke la aliaj venos kiel eble plej baldaŭ, kaj ke la ĉiuj malleĝuloj venos. Kutime tiaj homoj ne kredas sin reciproke, kaj volas kune ĉeesti por certigi, ke neniu kaŝos por si eregon de la trovaĵo. La ejo montrita troviĝis ĉe la montobazo (bazo - база; базис; основание, основа), en truo, kie, videble, neniu iris jam de jaroj. "Feliĉe, ke ili ne kaŝis tiun riĉaĵon trans la maro, ekzemple sur insulo (остров), kien nur per ŝipo oni povas iri. Se estis vere internacia societo, kiel Gerda diris, tio estis ebla, ĉu ne?" Tiel parolis Linda. "Vi pravas," diris Tom. "Mi tute ne ŝatus veturadi ŝipe. La maro ĉiam igas min malsana. Mi ŝatas rigardi la maron, resti ĉe la maro, libertempĉi apud la maro, sed ne veturadi per ŝipo sur ĝi: ŝipoj konstante (постоянно) dancas sur la maro, kaj mi tute ne ŝatas ilian dancon. Feliĉe, ke hodiaŭ oni povas flugveturilo iri preskaŭ ien ajn. Flugveturiloj preskaŭ tute ne dancas. Sed mi ŝatas nur duone eĉ flugveturilojn. Plej multe mi preferas, kiam mi veturas sur tero, sur bona firma tero. Mi bezonas sub mi ion pli firman ol akvo kaj aero. Plej bone estas iradi piede sur bona tera vojo. Mi..." Sed Linda interrompis lian paroladon, iom strangan en tiuj kondiĉoj, en kiuj ili troviĝis: "Kiam alvenos la riĉaĵ-serĉantoj, laŭ via opinio?" Ŝi demandis la policanon.

"Morgaŭ, tute certe. Ili ne povus alveni hodiaŭ, ĉar ne plu estis flugveturilo post la nia, kaj aŭte ili bezonus la tutan nokton. Verŝajne Bob flugos en la sama flugveturilo." La vetero estis bona. Ili starigis sian tendon en la apudeco, tamen bone prizorgante, ke ĝi ne estu videbla por alvenantoj. La sola maniero, laŭ kiu la riĉaĵoserĉantoj povus alveni antaŭ la morgaŭa tago, estus, ke ili flugu per malgranda flugveturilo, speciale luita (арендованный). Sed lui specialan flugveturilon kostas tiel multe, ke plej verŝajne ili ne uzos tiun rimedon (rimedo - средство; мера). La sekvantan matenon, niaj amikoj vekigis frue. Tuj la policano kaj la gestudentoj aranĝis, ke ĉiu el ili, unu post la alia, gardostarus en ejo, de kie eblas facile vidi la solan vojon – aŭ pli precize vojaĉon – laŭ kiu oni povas apudiĝi al la truo, kaj ke ĉiu havos en la truo sian difinitan (difini - определить, точно описать; установить, обозначить, назначить) kaŝejon. Post tri horoj da atendado, io fine okazis. Linda, kiu gardostaris en la iom alta ejo, faris la deciditan signon (signo - знак, обозначение; признак; символ), kaj rapide kuris de supre al siaj kunuloj. "Aŭto alvenas!" Ŝi kriis. En tiu ege soleca regiono (регион, область, край), kiu povus veni aŭte per tiu tera vojaĉo, se ne la riĉaĵoserĉantoj? La tri atendantoj sin kaŝis, ĉiu en sia difinita ejo, malantaŭ ŝtonegoj, da kiuj troviĝis multe en la truo.

23. Post duonhoro, iu envenis. Estis Bob! "Kie sin kaŝas la Lumserĉantoj?" li kriis, "ĉu en la mallumo?" La aliaj sin montris. "Rekaŝu vin, ili tuj alvenos," li diris.

"Kiel vi faris por antaŭi ilin?"

"Dank' al Gerda: Ŝi telefone aranĝis, ke veturilo atendu min ĉe la flughaveno, kaj ke aŭtisto min veturigu ĉi tien. Mono solvas multajn problemojn, kaj ŝi estas riĉa, kiel vi scias; ŝi donis tre precizajn priskribojn por ebligi al la aŭtisto trovi la ejon, kaj jen mi estas. Sed niaj riĉaĵoserĉantoj tuj alvenos. Ili flugis en la sama flugveturilo, kiel mi, kaj kiam la aŭtisto min trovis, mi vidis ilin iri al oficejo, kie oni luas aŭtojn." Tom kuris supren al la videjo. Post kelkaj minutoj, la aliaj aŭdis lian signon. Envenis la truon zorgistino Marta, ŝia frato la alta blankaharulo, la malgrasulo, kiu rilatis kun Gerda, kiam ŝi estis mallibera, kaj du aliaj viroj. "Profesoro Ronga!" mire diris al si la tri gestudentoj, kaj tuj poste ili aldonis: "Kaj Profesoro Fergus!" La unua lernigis

lingvosciencan, la dua anglan literaturon. Laŭ la malnova dokumento, la riĉaĵo troviĝis en fermita kesto (ящик) metita en truo aranĝita en la monto, kaj la ŝtonoj, kiuj ĝin kovris kaj kaŝis, kuŝis laŭ preciza desegno. Fakte, la preciza ejo estis montrita per signoj tiel multaj, kvankam diskretaj, ke la preterado de l' jarcentoj ne povu forpreni ĉiujn. Pro tiuj precizaj signoj, la preciza ejo iĝis rapide trovita. La grupo forprenis la kaŝantajn ŝtonojn. Montriĝis, ke la truo estis plenigita per malsamaj substancoj, kies celo verŝajne estis gardi la fermita kesto kontraŭ malsekeco. La kesto, kiun ili eltiris, ne estis tre granda, nek speciale bela aŭ valora. Ĝi estis ŝlosita. Per siaj iloj, ili ĝin malfermis.

24. "Nur papero!" kriis Ronga.

"Ankaŭ estas libro!" diris Marta, sed jam Ronga laŭtleĝis:

"Tie ĉi kuŝas la Riĉaĵo de la Lumo. Pro la ada ĉasado, la Sankta (СВЯТОЙ; СВЯЩЕННЫЙ) kaj Sekreta Frataro de la Lumo-Serĉantoj baldaŭ finos ekzisti. Sed ĝia Spirito plu vivos. Iun tagon, homoj retrovos la Sanktajn Principojn kaj rekomencos ilin uzi. Por ili estas ĉi tie kaŝita la Riĉaĵo de la Lumo. Ĝi estas skribita en la Speciala Lingvo de la Frataro, sed certe homoj troviĝos, kiuj ĝin povos kompreni. La Riĉaĵo konsistas (состоит) el la arto uzi kaj gardi la Veron, la Justecon (justa - справедливый, правильный, правый), la Indecon, la Respekton al ĉiu homo, la Interkomprenon, la Amon, la Kunsentemon kaj la Konon de si mem kaj de sia preciza ejo. Por la Frataro, la Spiritaj Valoroj estas la plej altaj. Tial ĝia Riĉaĵo estas pure Spiritita. Al vi, homo, kiu trovis ĝin, trans multaj aŭ malmultaj tagoj, monatoj, jaroj, jardekoj aŭ jarcentoj, Saluton kaj Fratecon!"

Ili sidis en komfortaj brakseĝoj en la domo de Gerda. "Kio okazis poste?" ĉi-lastaj demandis.

"Ni malkaŝis nin, kaj mi ilin arestis," diris la policano. "La eja polico estis antaŭe informita, kaj enŝlosis ilin."

"Ĉu vi scias, kiel komenciĝis la afero?" scivolis Tom.

"Apudume. Kiam Marta estis zorgistino en la sanigejo (можно и malsanulejo), ŝi ĉeestis sanigadon de historiisto, Prof. (=Profesoro) Kosadi. Kiam ĉilasta estis duone dormanta, duone vekiganta, li parolis nekonscie pri la riĉaĵo de la Lumoserĉantoj. Li diris, ke temas pri malnova societo, elstara, tre riĉa, pri kies riĉaĵo li eksciis okaze legante en la Vatikana Legejo."

"Jes," adigis Gerda. "Tiu eron de la afero mi konas. Li faris historian esploron en la Legejo Vatikana. Inter la paĝoj de malnova libro, li trovis dokumenton en la sekreta lingvo de la Lumoserĉantoj. Li antaŭe iomtempe interesiĝis pri tiu sekreta societo internacia, kaj iom komprenis ĝian sekretan lingvon. Li komprenis, ke tiu papero montras, kie troviĝas la riĉaĵo de la Lumoserĉantoj, sed mem ne povis traduki ĉiujn precizaĵojn. Li ricevis la permeson fotokopii la dokumenton. Foje, kiam ni renkontiĝis, li parolis pri tio al mi. Li diris, ke eble homoj provos trovi tiun riĉaĵon, ĉar pli kaj pli multaj homoj interesiĝas pri la malnovaj sekretaj societoj. Li sciis, ke mi estas la sola homo en la mondo, kiu vere bone lernis tiujn malnovajn sekretajn lingvojn, kaj li petis min promesi, ke mi neniam kunlaboros kun homoj serĉantaj la riĉaĵon pro propra intereso."

"Kion li volis, ke oni faru pri ĝi?" Linda demandis.

"Ke ĝi transiru al iu muzeo aŭ ŝtata oficejo."

Tom intervenis: "Kiel Marta ricevis la fotokopion?"

"Tion ŝi mem klarigis al mi," respondis la policano: "Ŝi rakontis, ke la substanco uzita por dormigi la profesoron estas unu el tiuj, kiujn oni iomfoje uzas por t.n. (= tiel nomata) alkoholoanalizo. Post la sanigado, kiam la profesoro kuŝis en sia ĉambro, ŝi enigis al li tiun substancan, kaj pridemandis lin. Sub la efiko ((воз)действие, влияние, эффект) de la substanco, oni dormas, sed dormante aŭdas kaj respondas demandojn, ĝenerale (обычно; вообще) dirante la veron. Li do dorme respondis al ŝi. Per tiu metodo ŝi eksciis pri tio, ke nur unu homo en la mondo, nome Gerda, komprenas tiun sekretan lingvon, kaj pri multaj aliaj aferoj."

25. "Sed vi ne respondis pri la fotokopio!"

"Ho, pardonu. La profesoro havis ĝin en sia paperujo. Li fartis tre malbone post la sanigado. Marta facile prenis la dokumenton el lia paperujo, dum li dormis; ŝi ja sciis, ke li ne vivos longe. Lia sano ne lasis multe da espero. Fakte, li baldaŭ mortis post tio. Neniu do zorgis pri la malaperinta papero."

"Kiel Ronga eniĝis en la aranĝon?"

"Li estis la amanto de Marta, kaj ŝi rakontis al li. Li vivas tiamaniere, ke li ade bezonas multe da mono. Li organizis la aferon. Estas li kaj kolego Fergus, kiuj forportis Gerdan, post kiam ili batis Bob senkonscia. La oficejo de Fergus estas tute apuda. Tien ili portis ŝin, kaj tie ili atendis, ĝis la vojo estis libera kaj ili povis veturigi ŝin al la forlasita domo." Gerda parolis: "La frato de Marta multfoje vizitis min, antaŭ iomaj monatoj. Li provis igi min traduki por li la dokumenton. Sed kiam mi demandis, de kie li ricevis ĝin, li iom blankiĝis, ne respondis tuj, kaj mi komprenis, ke li agis malprave. Mi memoris la vortojn de Prof. Kosadi, kaj malakceptis kunlabori. Sed li revenis unufoje, dufoje, trifoje. Mi ĉiufoje nea respondis. Kiam mi poste ricevis inviton de Prof. Ronga lernigi pri malnovaj sekretaj lingvoj, mi tute ne pensvidis, ke estas rilato inter Ronga kaj la junulo, kiu tiel ofte venis al mia domo peti, por ke mi traduku la paperon pri l' riĉaĵo."

"Jes," diris Tom. "Pro via multfoja nea respondo ili elpensis tiun planon. Kapti vin kaj perforte devigi vin traduki la tekston."

"Tiom da zorgoj por nenio!" komentis Gerda. "Kia malsaĝeco!"

"Jes. Malprofesiuloj," diris la policano malestime.

"Ili agis malprofesie ekde la komenco. Pro tio ni tiel facile ilin kaptis. Sed pri tiu malprofesieco vi danku Dion, Gerda. Pro tiu malprofesieco ni povis liberigi vin, kaj vi plu vivas. Profesiuloj en simila afero ne varius: vin uzinte, ili vin mortigus."

"Ĉu vere?"

"Jes. Vi sciis tro multe. Estus tro danĝere lasi vin vivi. Sincere, vi povas danki Dion, ke nur malprofesiuloj planis kaj realigis tiun aferon." Gerda malparolis, pensema. "Timege!" ŝi fine diris. "Ĉiaokaze, mi plej sincere dankas vin, ĉiun el vi. Vi agis mirinde. Vi savis min kaj mian filinon. Sed, Bob, kion vi opinias pri la tuta afero? Vi ankoraŭ diris nenion."

Bob rigardis ŝin, kun iom stranga esprimo. "Mi plezure trinkus tason da alkoholo," li diris. Kaj li restis malĝojeta, dum ĉiuj aliaj ekridis.

Ĝis la revido k ĉion bonan, Verserĉantoj k Belkreantoj!

## Словарь, содержащий 900 морфем!

**-a** окончание прилагательного, порядкового числительного, притяжательного местоимения, причастия

**abelo** пчела

**-aĉ-** суффикс, означающий низкое качество, никчемность, непригодность, малоценность и выражает презрение, пренебрежение, неуважение (характеризует внешние, объективные качества предмета или явления)

**aĉeti** покупать

**-ad-** суффикс, означающий длительное действие, процесс, повторяемость

**adreso** адрес

**aero** воздух

**afero** дело; вещь

**agi** действовать

**aĝo** возраст

**ajn** бы ни, угодно (частица)

**-aj-** суффикс, обозначающий предмет с определённым качеством, свойством; вещь

**akcepti** принимать

**akra** острый

**akvo** вода

**al** к, выражает значение дательного падежа

**alia** другой

**alkoholo** алкоголь

**almenaŭ** по крайней мере, по меньшей мере, хотя бы

**alta** высокий

**ami** любить

**amiko** друг

**amplekso** объём, размер

**-an-** суффикс, обозначающий жителя, члена коллектива, общества

**angla** английский

**angulo** угол

**ankaŭ** тоже, также

**ankoraŭ** ещё

**anstataŭ** вместо

**-ant-** суффикс, обозначающий действительное причастие (**-anta**) или деепричастие (**-ante**) настоящего времени

**antaŭ** перед

**aparteni** принадлежать

**apenaŭ** едва, (как) только, еле

**aperi** (по)явиться, показаться; возникнуть

**aprilo** апрель

**apud** около, не вплотную рядом

**-ar-** суффикс, обозначающий множество однородных предметов

**aranĝi** устраивать; обустроить

**arbo** дерево

**armi** вооружать; снаряжать

**artikolo** статья

**arto** искусство

**-as** окончание глагола настоящего времени

**aserto** утверждение, уверение

**-at-** суффикс, обозначающий страдательное причастие (**-ata**) или деепричастие (**-ate**) настоящего времени

**ataki** нападать

**atendi** ждать

**atento** внимание

**atingi** достичь, добраться до; добиться

**aŭ** или

**aŭdi** слышать

**aŭgusto** август

**aŭskulti** слушать

**(aŭto)buso** автобус

**aŭto(mobilo)** автомобиль

**baldaŭ** скоро, вскоре

**banko** банк

**barelo** бочка

**baro** преграда, препятствие

**bastono** палка

**batali** сражаться, бороться, биться, драться

**bati** бить

**bazo** база; базис; основание, основа

**bedaŭri** сожалеть

**bela** красивый

**benzino** бензин

**bero** ягода

**besto** животное, зверь

**bezoni** нуждаться, иметь потребность

**biciklo** велосипед

**bildo** картина, картинка, изображение, образ

**bileto** билет

**birdo** птица

**blanka** белый

**blua** синий, голубой

**bo-** приставка, означающая родство в результате брака

**bona** хороший, добрый

**bordo** берег

**botelo** бутылка

**bovo** бык

**brako** рука (вся)

**branĉo** ветвь, ветка; отрасль

**breto** полка

**brili** блестеть, сверкать, сиять

**brui** шуметь

**brusto** грудь

**buŝo** рот

**butero** сливочное масло

**butono** кнопка, пуговица

**cedi** уступить, поддаться

**celo** цель

**cent** сто

**centro** центр

**certe** конечно; уверенно, точно

**citrono** лимон

**ĉambro** комната

**ĉapo** шапка

**ĉar** потому что, так как, ибо

**ĉasi** охотиться

**ĉe** у, при, за; означает непосредственную близость по месту, одновременность по времени, условие совершения чего-то

**ĉefa** главный; старший (по должности, положению); высший

**ĉelo** клетка; ячейка; камера

**ĉemizo** рубашка

**ĉevalo** лошадь

**ĉi** это(т) (выражает близость)

**ĉia** всякий, любой

**ĉiam** всегда

**ĉie** везде

**ĉielo** небо

**ĉio** всё  
**ĉirkaŭ** вокруг, около  
**ĉiu** каждый  
**ĉokolado** шоколад  
**ĉu** разве, ли; выражает вопрос  
**da** предлог, означающий меру, количество, вес, неопределенную часть чего-то (с количественными числительными не употребляется)  
**danci** танцевать  
**danĝero** опасность  
**danki** благодарить  
**dato** дата, число месяца  
**de** от; выражает значение родительного падежа  
**decembro** декабрь  
**decidi** решить  
**dek** десять  
**dekstra** правый  
**demandi** спрашивать  
**densa** густой; плотный; частый  
**dento** зуб  
**dependi** зависеть  
**des** тем (соотносительно с 'чем')  
**desegni** рисовать, чертить  
**devi** долженствовать, быть должным, быть обязанным  
**difini** определить, точно описать; установить, обозначить, назначить  
**dika** толстый  
**dimanĉo** воскресенье  
**dio** бог  
**direkti** направлять; управлять  
**diri** сказать, говорить (что-либо)  
**dis-** приставка примерно соответствует приставке раз-  
**diskreta** сдержанный; ненавязчивый, умеренный; дискретный, прерывный  
**distanco** дистанция, расстояние, дальность  
**dividi** (по)делить, разделить  
**do** итак, следовательно, значит, (ну) же (для усиления при вопросе или приказе)  
**dokumento** документ  
**doloro** боль  
**dolĉa** сладкий

**domo** дом (здание)  
**donaco** подарок  
**doni** дать  
**dormi** спать  
**orso** спина  
**du** два  
**dubi** сомневаться  
**dum** во время, в течение, пока, в то время как  
**-e** окончание производного наречия, деепричастия  
**-ebi-** суффикс, означающий возможность  
**-ec-** суффикс, означающий свойство, качество, состояние  
**eĉ** даже  
**edzo** муж  
**efektiva** действительный, действующий, эффективный  
**efiko** (воз)действие, влияние, эффект  
**-eg-** суффикс увеличения, усиления  
**egala** равный, одинаковый; равномерный  
**-ej-** суффикс, означающий место, помещение  
**ek-** приставка, означающая начало или кратковременность действия  
**ekologio** экология  
**ekonomio** экономика; экономия  
**eks-** приставка, означающая: бывший  
**ekskurso** экскурсия, прогулка; экскурс, отступление от темы  
**eksplodi** взорваться  
**ekster** вне, за  
**ekvacio** уравнение  
**ekzameni** экзаменовать, проверять  
**ekzemplo** пример  
**ekzerci** упражнять, тренировать  
**ekzisti** существовать  
**el** из  
**elekti** выбирать, избирать  
**elektro** электричество  
**-em-** суффикс, означающий склонность к чему-либо  
**en** в

**-end-** суффикс, означающий необходимость, непереносимость, обязанность (которая должна быть выполнена)  
**energio** энергия  
**-er-** суффикс, означающий частицу целого  
**escepto** исключение  
**esperi** надеяться  
**esplori** исследовать, изучать; расследовать  
**esprimi** выразить  
**esti** быть, являться, находиться  
**estimi** уважать  
**-estr-** суффикс, означающий: руководитель, главный  
**-et-** суффикс уменьшения, ослабления  
**etaĝo** этаж  
**eviti** избегать, уклониться  
**evolui** эволюционировать, развиваться  
**facila** лёгкий, нетрудный  
**fadeno** нить  
**fajro** огонь  
**fako** отдел, отделение (ящика, стола, шкафа, учреждения); отсек; цех; специальность; раздел, область, отрасль (науки, культуры, промышленности)  
**fakto** факт  
**fali** упасть  
**fama** знаменитый, известный, славный  
**familio** семья  
**fari** делать  
**februaro** февраль  
**feliĉa** счастливый  
**fenestro** окно  
**feo** сказочное существо  
**fermi** закрыть  
**fero** железо  
**festi** праздновать  
**fi-** приставка, означающая презрение, моральное отвращение, антипатию (характеризует отношение к предмету или явлению со стороны говорящего)  
**fidela** верный, преданный  
**figuro** фигура



**fiksi** закреплять, фиксировать; установить  
**filmo** фильм, (кино, фото)плёнка  
**filo** сын  
**lingro** палец  
**fini** заканчивать  
**firma** крепкий  
**fiŝo** рыба  
**fiziko** физика  
**flanko** сторона, бок; склон  
**flava** жёлтый  
**flekxi** (со)гнуть, изогнуть  
**floro** цветок  
**flugj** лететь  
**flui** течь  
**fojo** раз  
**folio** лист  
**fonto** источник  
**for** прочь, долой, вон, отдаление, исключение (употребляется и в качестве приставки)  
**formo** форма  
**forta** сильный  
**fosi** копать  
**fot(ograf)i** фотографировать  
**frato** брат  
**fromaĝo** сыр  
**froti** тереть, натирать  
**frua** ранний  
**frukto** фрукт, плод  
**fumo** дым  
**fungo** гриб  
**funkcio** функция  
**gaja** весёлый  
**gardi** охранять, хранить, беречь  
**gaso** газ  
**gasto** гость  
**ge-** приставка, используемая для обозначения сразу обоих полов  
**gliti** скользить  
**globo** шар  
**glui** склеивать  
**grado** градус, степень  
**gramo** грамм  
**granda** большой, великий  
**grasa** жирный; тучный; полный (о ком-л.); жировой  
**gratuli** поздравить  
**grava** важный, значительный  
**grio** крупа

**gusto** вкус  
**ĝardeno** сад  
**ĝenerala** общий, всеобщий, генеральный  
**ĝi** он, она, оно - относится ко всем неодушевленным предметам, животным, а также к лицам, пол которых неизвестен.  
**ĝis** до  
**ĝoĵi** радоваться  
**halti** остановиться  
**haro** волос  
**haveno** гавань, порт  
**havi** иметь  
**haŭto** кожа (на человеке или животном); кожура; корка  
**helpi** помочь  
**herbo** трава  
**hierauf** вчера  
**historio** история  
**ho!** о!, ох!  
**hodiaŭ** сегодня  
**homo** человек  
**horloĝo** часы  
**horo** час  
**hotelo** гостиница, отель  
**humoro** настроение; нрав; жидкая среда организма  
**hundo** собака; virhundo кобель  
**-i** окончание глагола в неопределённой форме  
**ia** какой-то  
**iam** когда-то  
**ideo** идея  
**-id-** суффикс, означающий потомка  
**ie** где-то  
**-ig-** суффикс, означающий: сделать каким-либо, кем-либо, чем-либо, заставить, побудить к чему-либо  
**-iĝ-** суффикс, означающий: сделаться каким-либо, кем-либо, чем-либо, становиться  
**ili** они  
**-il-** суффикс, обозначающий орудие, инструмент  
**imposta** налог, сбор  
**-in-** суффикс, обозначающий женский пол

**-ind-** суффикс, означающий достойный определённого отношения  
**informi** информировать, извещать, сообщать  
**insekto** насекомое  
**insulo** остров  
**insulti** ругать  
**-int-** суффикс, обозначающий действительное причастие (**-inta**) или деепричастие (**-inte**) прошедшего времени  
**inter** между, среди  
**intereso** интерес  
**inviti** пригласить  
**io** что-то, что-либо, что-нибудь  
**iom** сколько-то, некоторое количество, немного  
**iri** идти  
**-is** окончание глагола прошедшего времени  
**-ism-** суффикс, означающий учение, направление, доктрину  
**-ist-** суффикс, означающий профессию, либо принадлежность к какой-либо партии, приверженность какому-либо учению, доктрине  
**-it-** суффикс, обозначающий страдательное причастие (**-ita**) или деепричастие (**-ite**) прошедшего времени  
**iu** кто-то, некто, некий, некоторый, какой-то  
**-j** окончание множественного числа существительного и прилагательного  
**ja** ведь, же  
**jako** пиджак, куртка  
**jam** уже  
**januaro** январь  
**jaro** год  
**je** предлог употребляемый, когда другие предлоги не подходят и для указания на определенный момент времени (иногда взаимозаменяем с аккузативом)  
**jen** вот  
**jes** да  
**ju** чем (– тем)  
**juĝi** судить

**julio** июль  
**juna** молодой, юный  
**junio** июнь  
**jupo** юбка  
**justa** справедливый  
**ĵaŭdo** четверг  
**ĵeti** бросить  
**ĵus** сейчас, только что  
**kaĉo** каша  
**kadro** рама, рамка; окружение; кадр  
**kafo** кофе  
**kaj** и, а  
**kajero** тетрадь  
**kalsono** кальсоны, подштанники, панталоны (нижние); **kalsoneto** плавки, трусики  
**kampo** поле  
**kanti** петь  
**kapo** голова  
**kapro** козёл  
**kapti** ловить, поймать  
**kara** дорогой, милый  
**karesi** ласкать, приласкать  
**karto** карта; карточка  
**kaŝi** прятать, скрывать  
**kato** кот, кошка  
**ke** что, чтобы  
**kemio** химия  
**kesto** ящик  
**kia** какой  
**kial** почему  
**kiam** когда  
**kie** где  
**kiel** как, в качестве  
**kies** чей  
**kio** что  
**kiom** сколько  
**kisi** (по)целовать  
**kiu** кто; который; какой из  
**klara** ясный  
**klaso** класс  
**klera** образованный, просвещённый  
**klini** наклонить  
**knabo** мальчик  
**koko** петух  
**kolego** коллега  
**koleri** сердиться, гневаться

**kolo** шея  
**kolono** колонна; столб  
**koloro** цвет  
**komenci** начать  
**komo** запятая  
**kompari** сравнить, сопоставить  
**kompreni** понять  
**komputi** вычислять; пользоваться компьютером  
**komuna** общий  
**kondiĉo** условие  
**konduki** вести, проводить; привести к чему-либо  
**koni** знать; быть знакомым с; быть осведомленным в; иметь представление о  
**konkuri** состязаться, соревноваться; соперничать  
**konscii** (о)сознавать  
**konsenti** согласиться  
**konservi** хранить, сохранять  
**konsideri** считать, учитывать, принять в расчёт  
**konsili** советовать  
**konsisti** состоять (из)  
**konstanta** постоянный  
**konstrui** строить  
**kontenta** довольный  
**konto** счет; учетная запись  
**kontraŭ** против  
**kopii** (с)копировать; переписывать  
**korbo** корзина, короб  
**korekti** исправить, поправить  
**korespondi** переписываться  
**koro** сердце  
**korpo** тело  
**korto** двор  
**kosti** стоить  
**kovri** покрыть  
**kran** кран трубопроводный  
**kredi** верить  
**krei** создавать, творить; образовать  
**kreski** расти  
**krii** кричать  
**kritiki** критиковать  
**krom** кроме  
**kruco** крест  
**kudri** шить  
**kuiri** варить, готовить пищу

kancero - malsano (tro- aŭ mis-kreskado de korpoĉeloj)  
kandelo - lumilo fajrigebla ŝnuro  
kandidato - iu, kiu volus esti elektita aŭ konsiderata por certa funkcio aŭ ofico  
kanono - paflego; rada kanto  
kanzono - kanto, ofte ŝerca  
kapabla - scipova bone fari ion  
kapitalo - tuto de mono, havaĵoj kaj iloj de unu persono aŭ de unu societo  
kaprica - subita, neantaŭvidebla volo  
karafo - larĝa (vitra) botelo  
karatero - ne-korpaj ecoj de homo; la (ĉiuspecaj) ecoj de io  
karbo - nigra fajrebla aĵo por varmigi, kutime el prahistoriaj kreskaĵoj  
kardiogramo - korbatalniso  
kardiologo - koristo, korfakulo  
karesi - ame tuŝ(ad)

karnavalo - festo, dum kiu oni ĝoĝiĝas, festas kunkioemege  
karno - molaj eroj de besto aŭ homo (ne haŭto, ne ostoj); enaĵo de frukto (ne semoj)  
karoto - (ruĝa, flava) manĝebla dolĉeta radiklo  
kartoĉo - ujeto kun ŝargaĵo  
kartono - dika kaj firma papero  
kaserolo - kuirpoto kun tenilo(j)  
kaseto - kesteto aŭ ŝranketo precizita al objekto(j) entenota(j)  
kasko - (garda) firma kapvesto/ĉapo  
kaskedo - ĉapo kun antaŭa elstarajo  
kaso - monkesto; monrimedoj, monhavo  
kastelo - (gardata) domego, loĝejo  
katalogo - tabelo de objektoj (vendataj, legataj,...)  
kataro - elfluo el nazo (pro malsano); "malvarmumo"  
katastrofo - subita, tre malfeliĉiga okazaĵo  
kategorio - aro da iel samspecaj objektoj, homoj, ideoj,..., laŭ iu ordigo  
katenoj - ringoj ĉirkaŭ la manradikoj de malliberigita homo  
kaŭĉuko - facile plilongigebla aĵo farita el suko de arbo  
kaŭzo-kialo  
kaverno - granda subtera truo  
kavo - malplenaĵo; truo/foso en tero  
kazo - dis(igit)e preparolata aŭ komparata okazaĵo aŭ situacio; difinita speciale lerninda/esplorinda okazaĵo  
kejljo - aĵeto por fermi truon aŭ por fiksi ion  
kelka - iom da, malmulte da  
kelkaj - 2, 3, 4  
kelnero - servisto, kiu alportas manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn  
kelo - subtera ero (ĉambro) de domo  
kerno - tio firma, kio estas en la mezo de io  
kilogramo - gramillo, 1000 gramoj  
kilometro - metromilo, 1000 metroj  
kino - film-arto; kinejo: domo, kie oni montras filmojn  
kirli - movi fluaĵon tiel, ke ĝi rapide turniĝas  
kirurgio - la arto sanigi per tranĉado...  
klasika - (literaturo, arto) verko malnova, sed ankoraŭ leginda, koninda; laŭ maniero bone elprovita  
klavo - plato, kiu oni premas por funkciigi muzikilon, skribmaŝinon,...  
kliento - iu, kiu kutime por certaj servoj venas al la sama fakulo; iu, kiu kutime certajn aĵojn aĉetas de la sama vendisto; servato; aĉetanto  
klimato - la meza vetero en iu ejo dum multaj jaroj  
klingo - tranĉo, akra rando; tiu ero de tranĉilo, kiu tranĉas  
kliniko - specialiĝinta malsanulejo  
klopodi - fari ĉion por sukcesigi ion; maltrankvile zorgi pri io  
klubo - malgranda societo  
knedi - ŝanĝi formon de mola substanco per ripeta premado  
kodo - signoj anstataŭ aliaj signoj  
koketa - kiu agas kaj vestas sin por altrii al si, venigi al si (por iu aliseksa)  
kokoso - hara frukto kun firma kovro, peza kaj granda, pli malpli globforma, en kiu estas suko kolekti - arigi, kunigi samajn aŭ similtajn aĵojn; kunvenigi  
kolektiva - (agado, laboro aŭ posedaĵo) de multaj homoj kune  
kolibro - eta birdo (flugante trinkas el floroj)  
kolonio - lando okupita kaj estrata de iu ŝtato, ne kiel ĝia egalrajta ero; homoj aŭ bestoj kiuj are ekloĝis ie  
kolumno - dividado de novaĵpapero,...; rekte (mal)supren en tabelo...  
komandi - havi ordonpovon; tiel ordoni  
kombi - ordigi hararon per ilo kun multaj maldikaj dentoj  
kombini - kunmeti multajn aferojn por iu celo; fari ligan inter multaj ideoj

komedio - ridiga, gaja teatraĵo  
komenti - diri aŭ skribi sian opinion pri tio, kion iu diris, skribis aŭ faris  
komerci - aĉeti kaj vendi (por havi profiton)  
komforta - ne laciga; bonsenta; tiel, ke oni sentas sin bone tie  
komika - ridiga  
komisii - transdoni laboron, taskon al iu alia  
komisiono - ar(et)o da homoj, por esplori demandon aŭ plenumi taskon  
komitato - aro da homoj, elektitaj por fari certajn taskojn  
kompakta - densa kaj forte kunigita; tiel ke ĉio kune okupas malmulte da spaco kaj ne facile disiĝas  
kompati - kunsenti malfeliĉon, kiam iu alia estas malfeliĉa  
kompili - составлять  
kompensi - doni ion por anstataŭi maltrovon; doni aŭ okazigi ion plezuratan, ĉar okazis malplezuraĵoj; pagi (ankaŭ ne per mono) pro ies penoj  
kompetenta - povanta bone fari sian laboron, havante la necesajn sciojn, konojn  
kompleta - ĉiura (sufiĉas eroj kaj kiomo)  
kompli - (plie) malfaciligi, per aldono de pliaj eroj al iu aĵo/afero  
komplimento - malgranda laŭdo direktata al la laŭdato  
komponi - muzikverki; kunmeti el malsamaj eroj, aĵetoj  
komuniki - sciigi; konigi  
komposti - prepari tekston por povi presi ĝin  
komunumo - aro da homoj kune vivantaj kaj kun komunaj intereso, sentantaj sin kunaj  
koncentri - direkti al centra punkto; plidensigi solvaĵon  
koncepto - ĝenerala ideo  
koncerni - speciale rilati al; havi gravecon por koncerto - muzika prezento  
konciza - esprimanta la ideo(j)n per malmulte da vortoj  
kondamni - juĝe sciigi, ke iu estas kulpa, kaj difini la punon  
konduki - agi laŭ iu maniero; esti amika aŭ ne; helpi homojn aŭ ne (konduki sin)  
konekti - fari la necesajn ligojn  
konferenco - kunveno de fakuloj por interkonsiliĝi pri gravaj demandoj aŭ aferoj  
konfesi - diri, ke oni faris ion malbonan, kiam iu demandas pri tio  
konfidi - kredi iun; esti certa pri la boneco, valoro de iu/ilo; transdoni taskon al iu, estante certa, ke tiu bone plenumos ĝin  
konfidenco - informo, kiu restu sekreta  
konfirmi - (ankaŭ) diri: "jes, tiel estas" aŭ "vi pravas"; (plie) certigi, ke io estas vera  
konfiti - prepari fruktojn en densa sukerfluaĵo; sukerigi  
konforma - preciza laŭ la nomitaj volegoj, postuloj; plenumanta la kondiĉojn  
konfuzi - maldordigi; malfaciligi; misi  
kongreso - granda kunveno por iu celo  
konkludi - ekkonscii (k informi) pri sekvo el faktoj aŭ asertoj  
konkordo - kora konsento inter homoj; sameco de sentoj, opinioj,...  
konkrete - tio, kio estas sentumebla (tuŝebla, aŭdebla, videbla, flarebla, gustumebla...), ne nur estanta en pensoj  
konkurenco - konkurado  
konkurso - provo eltrovi, kiu estas plej scipova  
konscienco - konscio pri bono kaj malbono, pri tio, kion oni devas fari kaj tio, kion oni devus ne fari  
konsekvenco - tio, kio sekvas al io  
konservativa konservema, konservisma  
konsilio - konsilantaro, konsilistaro  
konsoli - (provi) malpligi la malĝojon de iu  
konstati - informi/ekkonscii, ke io estas fakto  
konsterni - (subite) mirigi iun, tiel, ke tiu (preskaŭ) ne plu povas paroli aŭ agi

konstitucio - ĉefa leĝo de ŝtato  
konsulo - homo, kiu en iu urbo aŭ regiono en alia lando gardas la interesojn de siaj samlandanoj; homo, kiu en iu lando, regiono aŭ urbo servas al siaj samasocianoj  
konsulti - demandi (fakulon) aŭ rigardi (fakan libron) por ekscii ion pri io  
konsumi - iom post iom tale malestigi aŭ foruzi kontakto - kiam du objektoj tuŝas unu la alian; kiam du homoj havas interrilaton  
kontesti - en interparolo malakcepti aserton; esprimi sin kontraŭ iu opinio  
kontinento - dividajo de Tero [Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio, Eŭropo]  
kontrakti - fari oficialan (skriban) interkonsenton pri laboro  
kontrasto - klare videbla malsameco (kiam oni vidas tion apud ĉi tio)  
kontribui - fari sian eron de komuna laboro; pagi sian eron de la kostoj de io komune uzinda  
kontroli - ekzameni; esplori, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti  
kontuzi - kialii (per bato,...), ke sango disfluas  
konvalo - arbara kreskaĵo kun kutime du folioj kaj pluraj bonodoraj floroj  
konvena - tia, ke ĝi ĝenerale doni bonsenton al al aliaj homoj en certaj ĉirkaŭokazaĵoj  
konversacia - interparoli  
konverti - transformi, transigi  
konvinki - per pruvoj akceptigi ideon  
konvulsio - senvola, ne-regata movo  
kordo - fadeno sur muzikilo por sonigi ĝin  
koridoro (tra)irejo; irejo inter ĉamb(eto)j  
korno - elstarajo sur la kapo de iuj bestoj; muzikilo farita el tio  
kosmo - ĉio ekster Tero; tio, en kio estas steloj, planedoj...  
kotizo - mono, kiun oni (regule) pagas por esti ano  
koto - aŭ - malpuraĵo (el tero kaj akvo)  
koverto - sendoskribujo  
krabo - iu el dekpiedaj (iom rondaj) akvobestoj  
kraĉi - eljeti akvon el buŝo  
krado - aro da arbaĵaj aŭ feraj tuboj, fortike interligitaj (kiel barilo; por surmeti ion,...)  
kraĵono - skribilo  
krampo - fiksilo en formo de "L"; skribsigno "l" (ronda), "l" (rekta), "l" (malrekta) aŭ "<" ; (angula)  
kranio - la ostoj de la kapo  
kravato - mallarĝa tuko, kiun iuj (viroj) ligas ĉirkaŭ la kolan  
kremo - la graso ero de lakto; la plej bona parto de io  
krepusko - mateniĝo; vesperiĝo; duonlumo  
kresto - ruĝa elkreskaĵo sur kapo de virkoko...  
kreto - blanka ŝtono facile pulverigebla (CaCO3); ero el tiu aŭ simila substanco por skribi (ekzemple sur tabulo en lernejo,...) aŭ desegni  
krevi - subite rompiĝi  
krimo - (tre) puninda ago [ŝtelo, mortigo,...]  
kripla - kun ero de la korpo (piedo, brako,...) ne bone funkcia aŭ neestanta  
kristalo - kemia substanco en regula formo (ofte tre pura, travidebla, pli brila ol normala vitro)  
kriterio - grava aserto aŭ fakto, laŭ kiu oni decidis aferon  
krizo - danĝera ero de tempo; subita ŝanĝiĝo de (politikaj, sociaj,...) cirkonstancoj; grava ŝanĝo en evoluo de malsano  
krokodili - paroli naclingve inter Eo-parolantoj  
krono - ringo-forma kapvesto el metalo, floroj, folioj,...; supro de dento  
kruc - ujo por fluaĵoj  
kruda - neprilaborita, nepreparita; malpreciza  
kruela - ŝatanta suferigi  
kruro - plienpiedo; tiu ero de la korpo, per kiu homo aŭ besto iras; simila ero, sur kiu staras objekto  
krusto - malmola supra aŭ ekstera ero (kuiraĵo; pro varmo; vundo: pro sekiĝo de sango)

kubuto - la ero por fleksi la brakon  
kuglo - ronda ero da malmola metalo, kiun elpafas paŭlo  
kukolo - birdo, kiu metas siajn ovojn en loĝejon de aliaj birdoj (kukuas: "ku-ku")  
kulo - fiinsekteto, kiu trinkas sangon kaj flugas kultivi : (zorge) kreskigi (kreskaĵojn)  
kupolo - pli-malpli duongloba kovraĵo de domo  
kupono - detranĉita ero (bileto,...), kiu kiel tia donas rajton pri io  
kupro - ruĝeblava metalo (Cu)  
kuraci - sanigi  
kurba - nereakta, malrekta (linio)  
kurento - fluo de elektro  
kurioza - scivolemiga pro nekutimeco aŭ malofteco  
kurso - serio da lecionoj; difinita vojo sekvenda  
kurteno - tuko antaŭ fenestro  
kurzo - kosto ne firma, sed dependa de aĉetemo kaj vendemo  
kuseno - sako el ŝtofo, plenigita per molaĵoj, sur kiu oni subtenas sian kapon aŭ korpon, en aŭ ekster lito  
kuzo - filo de frat(in)o de patr(in)o  
kvadrato - kvarangulo kun same longaj flankoj kaj rektaj anguloj (de 90 gradoj)  
kvalito - eco, kielo; tio, kio estas speciale bona en io; tio, kio estas speciala en io  
kvanto - kiomo; tiom, kiom estas (tiom da metroj da...)  
kvartalo - ero de urbo  
kvereli - fi-akr-interparoli  
kverko - arbo kun ovoformaj fruktetoj kun "ĉapeto"  
kvieti - tute trankvila, paceca; kiu ne rapide ekkoleras  
kvitanco - papera skribaĵo pri ricevo de mono aŭ aĵo(j)  
laboratorio - laborejo por (sciencaj, kemiaj,...) esploroj,...  
lacerto - besteto kun mallongaj piedoj kaj longa malantaŭa elstara ero, rapide kuranta, manĝas insektojn  
laĉo - ŝu-ligilo, ŝu-ŝnur(et)o (por fermi ŝuon)  
lado - maldika metalplato, uzata interalie por fari skatolojn por konservi manĝaĵojn  
laiko - homo, kiu ne estas specialisto  
lako - brila desegnaĵo  
lama - ne povanta iri bone  
lameno - mallarĝa, tre maldika (metala, plasta,...) plato  
lanĉi - enuzigi, komenci, ekfunkcigi  
lano - la molaj haroj de ŝafo, uzataj por fari vestojn  
lardo - porka graso  
larmo - akvero, kiu fluas el la okuloj  
larvo - formo de insekto, tiel, kiel ĝi eliras el ovo (ne fluganta)  
laterno - manlumilo  
latitudo - kiom da gradoj norde aŭ malnorde  
laŭbo - konstruaĵo farita el foliaro (de arboj) en ĝardeno  
lazura - ĉieloblua  
ledo - prilaborita (senharigita) haŭto de besto  
legala - laŭleĝa  
lekcio - lerniga parolado en alta lernejo  
leki - forpreni (fluaĵon) de io per la lango  
lenso - vitro kun malrekta(i) surfaco(j), por devigi (direkti al centra punkto) lumradiojn  
leono - granda virbesto kun kolharoj, parenca al kato  
leporo - ne tre granda besto kun longaj oreloj  
lerta - kiu povas facile kaj rapide fari ion  
lesivo - akvo kun sapo aŭ alia lavilo  
levi - altpreni, altiĝi  
libelo - longa insekto kun kvar longaj flugiloj  
licenco - permesilo; permeso de la ŝtato (aŭ rajtanta) por fari ion, vendi ion,..., kion laŭleĝe nur la ŝtato (aŭ tiu rajtanta) rajtas; escepta permeso  
liceo - speca mezlernejo

lifto - maŝino por altigi homojn aŭ aĵojn (al alia etaĝo)  
ligno - tio, el kio konsistas arbutubo  
liki - tralasi fluaĵon aŭ gason (iom post iom)  
likvo - fluaĵo  
likvoro - forta (30-40%) alkoholaĵo (kaj sukero)  
lingvistiko - lingvoscienco  
litero - unu en aro {a, b, c, ..., v, z}  
liveri - havigi aĉetitan objekton al la aĉetinto; alporti menditaĵojn, poŝtaĵojn, ...  
lobo - (duon)ronda elstara ero (de orelo, nazo, folio, ...)  
logi - altiri al si, venigi al si, proponante ion bonan aŭ volegatan  
lojala - fidela al sia estro, amiko, ...  
loko = ejo  
logiko - (scienco pri) la leĝoj de la pensado  
lokomotivo - maŝinvagono; maŝino sur radoj por tiri vagonojn (de fervojo)  
longitudo - kiom da gradoj oriente aŭ maloriente  
loto - objekto, kiun oni ĵetas por decidi ion; objekto, kiun oni elektas aŭ aĉetas por ricevi ion (aŭ ne) laŭ numero sur ĝi; tio, kion oni ekhavas tiel  
lubriki - meti glitigan substancan inter maŝinerojn, ...  
lukso - havado aŭ uzado de multekostaj, ne necesaj, sed plezurigaj aĵoj  
lukti batali  
luli - movi ideton tien kaj reen por dormigi ĝin  
lupo - besto tre simila al granda hundo (kaj ĝia antaŭulo)  
luti - fiksi metalon al metalo per varmego  
maĉi - dispreni en la buŝo per la dentoj  
magazeno - granda vendejo  
magazino - urba konsilantaro  
magio - (kvazaŭa) sorĉado  
magistro - kiu finis universitaton  
magistrato - urba konsilantaro  
magneto - metalaĵo, kiu altiras aliajn metalaĵojn  
maizo - alta herbo kun flava cilindro-forma frukto, sur kiu sidas multaj semoj  
majstro - alte ŝatata lernigisto; bonega fakulo maksimumo - pli granda ne eblas; pli multe ne eblas  
makulo - alikolora punkto aŭ ejo; malbona ero  
makzelo - (supra kaj malsupra) ostoj de la buŝo  
malica - konscie malbonfarema  
malvarmumo - malsaneto "pro malvarmo"  
mamo - ero de la korpo de homo aŭ besto, en kiu estas organo produktanta lakton por ido  
mamulo - kvarpieda besto, kies inoj manĝigas siajn, vive naskitajn, junajn idojn per lakto  
manaĝero - direktisto, estro  
mandato - rajtigo reprezenti homon, ...; dokumento pri tia rajtigo; ordo pri (el)pagado de mono  
maniko - ero de vesto, kiu kovras la brakon  
manipuli - funkciigi per mano; uzigi laŭ sia volo; konscie misformi diraĵojn  
manki - ne esti (kie tio/tiu devus esti); malsufiĉi  
manovri - per ŝanĝoj de direkto meti aŭton, ŝipon, ... en la necesan ejon  
mantelo - longa vesto, kovranta la aliajn vestojn  
mapo - karto; folio kun desegno de la mondo aŭ de (ero de) lando (kun vojoj, urboj, ...)  
marĉo - tero tre malseka; lago plena de malpuraĵoj kaj kreskaĵoj  
marko - rekonilo; papereto kun ia valoro; nomo de mono en iuj landoj  
marmelado - densa (kuirita) kaĉo el fruktoj kaj sukero  
marŝi - (piede) iri, regule kaj ne tro malrapide  
martelo - iu batilo: peza ferero kun arbaja tenilo  
masko - artefarita vizaĝo (por festo, gardo, ...)  
maso - nedifinita substanco tutaĵo da io; la kiomo de substanco, mezurata laŭ gramoj  
masoni - konstrui el ŝtonoj  
masto - arbakolono sur ŝipo aŭ boato

mastro - estro de labor(ejo), domo, trinkejo, ...  
materialo - tio, el kio oni faras ion  
materio - ĉio, el kio konsistas aĵoj (ne spirito)  
mato - kovraĵo por planko  
matraco - granda dika plata kovraĵo de lito, sur kiu oni dormas  
matura - finkreskinta, plene evoluinta  
mazuto - peza oleo  
medio - la socia aŭ natura ĉirkaŭaĵo de iu  
medicino - sanigoscienco; scienco pri sano kaj malsano  
medikamento - substanco, uzata por sanigi  
mediti - pensadi ne por certa celo  
mefito - besto, kiu povas rapide eligi odoraĉan fluaĵon  
meĥaniko - ero de la scienco fiziko, pri movoj kaj fortoj, ...  
meĥanismo - tiuj eroj en maŝino, kiuj kune atingas certan rezulton; la sistemo de kune aranĝitaj eroj (de maŝino, lingvo, ...) kaj ilia maniero de funkciado  
meĵlo - iulanda mezuro por distanco (inter 1400 kaj 10000 metroj); angla meĵlo: 1609 m; marmejlo: 1852 m  
melki - elpreni lakton de bovino, kaprino, ...  
melodio - sinsekvaj sonoj en muziko  
melono - granda flava globforma dolĉa frukto  
membro = ano  
mencii - mallonge preparoli; nur diri, ne plie preparoli  
menso - la pensanta ero de la spirito (ne la sentemo)  
mensogi - diri malveron  
mentono - ero de la vizaĝo sub la buŝo  
menuo - listo de elekteleblaj manĝaĵoj en manĝejo  
mesaĝo - sciigo; informo sendata de unu homo al alia(j)  
metio - manlabora profesio  
meteologio - veteroscienco  
metodiko, metodologio - metodscienco, metodsistemo  
metro(politen)o - subtera fervojo  
mevo - iu el laŭte kriaĵoj blank-nigraj marbirdoj (ĉefe ĉe la marbordo, iuj land-interne)  
mielo - dolĉa fluaĵo kiu venas de tio, kion abeloj prenas en floroj  
mieno - vizaĝo montranta pensojn, sentoj; vizaĝesprimo  
migri - iri de unu loĝejo al alia (fara) ejo, por ekloĝi tie; iri de ejo al ejo, ne havante konstantan loĝejon  
miksi - kunigi (unu tra la alia) per movoj  
milda malakra; malsevera; varmeta  
miliardo - 1 000 000 000  
milimetro - 0,001 metro  
miliono - 1 000 000  
militi - malpaci; per multaj homoj kaj armlitoj batali kontraŭ malamika lando (aŭ kontraŭ enlandaj malamikoj)  
minaci - promesi fari ion malbonan aŭ maluzindan  
minimumo - pli malgranda ne eblas; pli malmulte ne eblas  
ministro - ano de ŝtata estraro, estranta unu el la fakoj  
mino - truo en tero, sub tero, ...; el kiu oni fosas substancojn; tru(eto) en tero, muro, ...; en kiun oni metis eksplodan substancan; kest(eto) kun eksploda substanco  
miraklo - io, kio estas (aŭ ŝajnas esti) kontraŭa al la leĝoj de la naturo, sed kio tamen okazas; io, kio ŝajnas ne ebla, sed kio tamen okazis  
mistero - afero kaŝita aŭ neklarigebla  
mistifiki - misinformigi iun, uzante ties (tro)kredemon  
mito - tradicia rakonto pri la agoj de la dio(j) aŭ de la prauloj "en la komenco de la tempo"  
mizero - malfeliĉego; malriĉego  
modera - ne (mal)tro; ne tro postulanta  
moderna - laŭ la opinioj, normoj, postuloj de la nuna tempo

modesta - ne havanta altan opinion pri siaj faroj aŭ scioj; (io) ne tro grava aŭ valora  
modifi - iom ŝanĝi (laŭ bezono)  
modo - ne-ada ĝenerala kutimo (pri vestoj, ...)  
mojosa - bonega, bonuma, ŝatinda  
moki - firdi  
molekulo - plej malgranda ero de kemiaĵo  
havanta la ecojn de la tuto  
monstro - estaĵo aŭ estulo kun nenormala (timiga) formo  
monumento - konstruaĵo por memorigi homon aŭ okazaĵon aŭ la iamajn kulturon  
moralo - lernigo aŭ reguloj por malsamvidi inter bono kaj malbono  
mordi - premi per la (antaŭaj, tranĉaj) dentoj  
moro - kutimo en iu homareto  
mortero - substanco por kunligi ŝtonojn  
motivo - io, kio igas iun agi tiel aŭ tiel; malgranda ero de muzikaĵo kun signifo; (ripetata) desegnaĵo (sur muro, en ŝtofo, ...)  
motoro - maŝino por transigi ian energion en movon  
mueli - diserigi, pulvorigi per maŝino aŭ inter du ŝtonoj  
muĝi - aŭdigi neklaran, fortan, longan sonon (kiel bovo)  
multipliki obligi  
munti - precize kunmeti la erojn de maŝino/filmo, ...  
murdo - mortigo  
murmuri - neklare paroli; fari sonon de rivereto  
musko - etaj kreskaĵoj kun foliecaj branĉetoj kaj dense sidantaj folioj (kovrantaj pli-malpli grandajn surfacojn)  
muskolo - ero de la korpo de homo aŭ besto, kiu ebligas movojn en la korpo kaj de la korpo muso - malgranda besto kun longa vosto, kiu ofte loĝas sub planko aŭ en kampo/arbaro; pli malgranda, ol rato  
muŝo - iu el duflugilaj insektoj, rapide fluganta, ofta ĉe homoj kaj bestoj  
muta - ne povanta paroli; sensona  
muzelo - elstara ero de la kapo de iuj bestoj, kun nazo kaj buŝo  
naiva - (tro) kredema, malkaŝema  
nadlo - montrilo; akrobatieto  
najbaro - homo, kiu loĝas apude; homo, kiu sidas apude  
naĵo - akra metala aĵeto por fiksi objekton enpreman aŭ enbatante ĝin  
naĵtingalo - birdo laŭdire plej bele kantanta  
nebuloso - densa akva gaso malklariganta la vidon  
negativa - minusa, subnula; nea; malakcepta; malpermesa  
neglekti - ne zorgi; malatenti; malzorgi  
negro - malblank(a)haŭtulo  
neĝo - plataĵo eretoj el frostiĝinta akvo kiuj falas el ĉielo  
nepo - filo de fil(in)o  
nepra - necesega; nemalhavebla; neevitebla  
nervozita - maltrankvila, kiu facile ekfariĝas, pensevidiĝas  
nesto - tio, kion konstruas birdoj por enmeti siajn ovojn; loĝejo de birdo  
neto - skribaĵo en definitiva formo, sen korektoj, ...  
neŭtrala - kiu ne volas akrinterparoli aŭ batali; kiu ne subtenas unu el la partiojn en interparolo, ...  
nevo - filo de frat(in)o  
nigra - malblanka  
nilono - arta kemiaĵo, el kiu oni interalie faras fadenojn  
-nĵi - kara virino aŭ knabino (panjo = pa(trino) + -nĵo; filinjo = fili(no) + -nĵo; Manjo = Ma(ria) + -nĵo)  
nobla - kun alta bona eco; bonfara, estiminda  
nocio - difinebla ideo; tio, kion oni volas esprimi per vorto

nodo - ligo de ŝnuroj, fadenoj, ...; punkto, kie nenkontiĝas (fer)vojoj, ...; centra punkto de problemo  
noto - malgranda skribaĵo pri io (por ke oni memoru pri tio); io, kion oni fiksas en sian memoron; skribsigno por muzika sono  
novelo - literatura rakonto  
novico - novulo  
nuanco - tre malgranda malsamaĵo  
nubo - densa akvogaso en aero/ĉielo; tio el kio falas ĉielakvo  
nuda - senvesta  
nuko - la malantaŭo de la kolo, inter kapo kaj dorso  
numeralo - nombrovorto  
nupto - geedziĝo, edz(ini)ĝo (festo aŭ fakto)  
nutri - doni manĝon  
obei - fari tion, kion iu ordonas  
obligacio - valorpapero, repagebla laŭ fiksa kondiĉoj  
oblikva - kliniĝanta; klinita  
observi - rigardadi; rigardi kun ada atento; fari ion laŭ la reguloj  
obstaklo - malhelpo (dum en- aŭ trairado), baro  
obstina - firme restanta je sia propra volo aŭ opinio, malgraŭ la kritikoj de aliaj  
obtuza - malakra  
oceanoo - marego  
oferi - donaci al dio; doni ion valoran por ricevi ion pli valoran  
oferti - proponi ion por vendo  
okcidento - maloriento  
oksigeno - gaso en spirata aero necesa por vivo (O)  
olivo - verda ovoforma manĝebla oleeca frukt(eto)  
ombrelo - portebla ilo kontraŭ ĉielakvo aŭ suno  
ombro - malpli luma ejo, ne aŭ malpli prilumata (ankaŭ en formo de figuro)  
ondo - ripetiĝanta plialtiĝo de la akvo-surfaco  
ontologio - estolernigado  
operacii - (provi) sanigi per tranĉado; fari malfacilan agadon; fari komputon  
opero - muzika teatraĵo  
opio - dormiga substanco el la laktosuko  
oponi - kontraŭi ies opiniojn kaj provi malhelpi ilian plenumiĝon; kontraŭ-agi  
oportuna - faciliganta ag(ad)on aŭ labor(ad)on  
opozicii - (politike) kontraŭi al la estraro  
oratoro - kiu scipovas bele kaj bone paroli al homoj  
ordinara - ne speciala; tia, kiaj ekzistas multaj; ĉiutaga  
orfo - homo (ido), kies patro kaj patrino mortis  
organika - kemia ligita kun (C)  
organizi - estri kaj laborigi homojn, venigante ankaŭ la necesajn rimedojn, por ke ili kune faru laboron  
orgeno - granda muzikilo konsistanta el multaj tuboj, ...  
orienti - konstrui ion tiel, ke la antaŭo estas oriente; doni direkton  
originalo - la komenca formo de io (ne kopio; ne similfaraĵo; ne traduko, ...); io kopiota, tradukota  
origino - komenco, deveno  
orkestro - muzikistaro  
ornami - plibeligi (per aldonadoj)  
oro - flaveca valora metalo (Au)  
orto - "rekta angulo"; angulo de 90°  
ortografio - oficiala skribmaniero de iu lingvo  
oscedi - larĝe malfermi la buŝon (kun enspiro kaj elspiro) pro dormemo, ...  
ovala - ovoforma; pli-malpli ronda  
-oz- - -plen-, -riĉ-, malsan-  
paciento - homo sanigata  
pacifismo - pacismo, pacamo  
pacienca - trankvile atendanta (okazaĵon, ...)  
paĉjo - kara vorto por patro (pa(tro) + -ĉjo)  
pado - vojeto (ne por veturiloj) (en arbaro, ĝardeno, ...)  
pajlo - sekiĝintaj aŭ sekigitaj firmaj herboj  
pala - senkolora; kun malforta koloro

palaco - granda domo de riĉulo,...  
paleontologio - scienco pri pravivaĵoj  
palmo - varmlanda senbranĉa arbo, el kies supra kreskas grandegaj folioj  
palpi - provi senti per fingroj; tuŝi per fingroj/mano  
palpebro - ero de haŭto, per kiu oni povas fermi okulon  
palto - vesto super vestoj  
panaceo - universala sanigilo  
pandemio - tutmonda malsano  
paneo - subita nefunkciado de maŝino, aŭto,...  
paniko - subita timego, ofte sen sufiĉa kialo  
panjo - kara vorto por patrino (pa(trino) + -njo)  
pantoflo - (ofte mola) ŝuo por uzo en la domo  
papago - birdo, kiu povas senkomprene ripeti vortojn  
papavo - iu el herboj kun semoj en "bareloto"  
papilio - iu el insektoj kun kvar relative grandaj, ofte koloraj flugiloj  
paradizo - ejo, kie ĉio estas bona (en rakontoj,...)  
paralelo - linio, ĉie je sama distanco de alia linio  
paranormala preternormala  
paraŝuto - kunmetaĵo el tuko kaj ŝnuroj, kiu malrapidas faladon (post salto el flugmaŝino)  
parazito - estaĵo vivanta en aŭ sur alia estaĵo, kaj manĝanta per la sukco aŭ ĉeloj de tiu alia parfumo - bon-odora substanco solvita en alkoholo aŭ oleo  
parkere (laŭ)memore; havante ion en sia memoro  
paro duopo  
parto - ero; ne la tuto, sed ligita (nun aŭ iam) al la tuto  
pasaĝero - iu, kiu veturas per veturilo, ne veturigante ĝin  
pasero - birdeto kun mallonga birdmanĝilo, kiu vivas preskaŭ ĉie, kie vivas homoj  
pasi - ne resti; preteriri/trairi sen halto  
pasio - fortega voĉo sento; amego  
pasiva - ne mem aganta; ne kontraŭaganta  
pasto - pli-malpli densa substanco por fari panon, kukon,...  
pastro - iu faras aŭ estras di-servojn  
partopreni - ĉeesti kaj kunfari; fari ion kune kun aliaj homoj  
paŝi - ireri; piede iri; meti unu piedon antaŭ la alian  
paŝti - konduki bovojn, kaprojn, ŝafojn,... sur herbejo, por ke ili manĝu herbon  
pato - ne alta senkovrila (metala) pota (ofte kun longa tenilo)  
paŭzi - nelonge interrompi agadon  
peco - ero el tuto, ne (plu) ligita al la tuto; rompaĵo; unu el multaj samaj aŭ similaj pedagogo - lernigisto  
pedalo - ero de maŝino/veturilo, kiun oni movas per piedo  
pego - birdo kiu batadas arbon pro insektoj  
pekli - meti en salon (sal-akvon) (por konservi,...)  
peli - irigi, kurigi antaŭ si; forkurigi  
pelto - preparita besta haŭto por fari veston  
pendolo - (longa) pezaĵo, pendanta je fiksa punkto kaj movanta tien kaj reen laŭ egalaj temperoj  
peniko - bastoneto kun aro da haroj, uzata por glui, desegni,...  
penetri - eniĝi, eniri; trairi ion  
pensio - ĉiumonata pago pro iama laboro ne plu farata  
penti - senti malĝojon pro malbona fero  
penti - fari (desegni) bildon per kolorfluaĵoj  
percento, procento - elcent(a)ĵo  
perdi - ekmalhavi; ekhavi malprofiton  
pere - morti pro subita okazaĵo; neatendite neniĝi  
perfekta - tute tia, kia ĝi devas esti; bonega; sen malbonpunkta

perfidio - malfidele endanĝerigi; misinformige fari ion kontraŭ la atendoj aŭ la intereso de iu  
periodo - (iom longa) ero de tempo; tempo inter du el multaj samaj okazaĵoj, kiuj okazadas kun regulaj intertempoj  
perlo - brila blanka valora mar-globeto  
perono - kelkŝtupa ŝtuparo, kun pli larĝa plata supra, antaŭ domo; simila aĵo por faciligi eniron en tramon aŭ buson  
persekuti - ade postsekvi (por fari ion malbonan al iu)  
persiko - tre sukoplana dolĉeta frukto  
persisti - adigi, plu fari malgraŭ malhelpoj  
persono - homo, konebla laŭ nomo aŭ funkcio; homo kun siaj propraj ecoj  
pesi - mezuri, kiom peza io estas  
petoli - fari ne bezonatajn, ne seriozajn, ĝojigajn agojn (ofte nepripensitajn)  
petrolo - ĉiu el malsamaj fluaĵoj el ter-oleo (lampa oleo, benzino,...)  
pia - ame estima al dio  
piceo - norda arbo kun "kudriloj"  
pigra - mallaborema  
piki - akribati en unu punkto  
pilo - fonto de elektra energio el kemia energio  
pilko - rondludilo; globforma ludilo  
pilolo - sanigilo/dolĉaĵo en formo de malmola globeto  
piloto - veturigisto de flugmaŝino; direktisto por ŝipoj, por eniri havenon aŭ por ŝipi sur rivero  
pinĉo - kunpremi per du fingroj (aŭ simile per iloj)  
pinglo - metala, maldika, rekta aĵeto kun kudrileca fino  
pingveno - subakve naĝanta, ne flugipova mar-birdo (en malordo) (sur tero ĝi staras "kvazaŭ homo")  
pino - arbo kun "kudriloj"  
pinto - akra, anguleca, kudrileca fino de io; anguleca supra de monto,...  
pioĉo - bat-fosilo (en formo de T)  
pioniro - iu, kiu preparas neniam kulturitan teron; iu, kiu laboras por nova ideo; unu el unuaj, kiuj faras ion  
pipo - tubo finiĝanta per ujeto, kiun oni fajrigas por fumado  
pizo - globforma semo, manĝata kiel legomo  
placebo - ŝainsanigilo  
plaĉi - doni bonsenton al iu, pro elrigardo aŭ agado  
plado - granda telero; ne kuna/dis(igit)a ero de manĝo  
plafono - malplanko; supra plato de ĉambro; loĝejsupro  
plago - granda, longeada tre malfeliĉiga okazaĵo  
plago - marbordo, naĝejo  
plando - la flanko de la piedo, kiu tuŝas la teron dum irado  
plandumo - la malsupra, plata ero de ŝuo  
planto - kreskaĵo; vivaĵo ne povanta movi sin de ejo al ejo (ne besto)  
plekti - interkrucige kunigi  
pleto - plato, kiu servas por alporti (permane) telerojn, tasojn,...  
plonĝi - ĵeti sin en akvon (por naĝi)  
plori - malridi; malĝoji (aŭ ĝoji) tiel, ke akveroj fluas el la okuloj  
plugi - per ilo turni la supran eron de tero  
plumbo - mola, peza metalo (Pb)  
plumo - birdkovraĵero; tio, kio kovras la haŭton de birdo; skribilo  
pluralo multnombro  
pluraj - pli ol unu (aŭ du); ne nur unu  
pluvo - ĉielakvo; akvo falanta el ĉielo  
poento - valorunu, taksunu, unuo  
poligloto - multlingvulo  
poligono - multangulo  
polipo - tubereto (kreskaĵo en la korpo)  
polpo - ok-braka mar-besto  
poluro - surfaca brilo pro frotado  
poluso - la punkto, ĉirkaŭ kiu la steloj ŝajnas turniĝi en la ĉielo

popolo - homarero; nacio; homoj kiuj sentas sin samaj, ofte kun la sama lingvo, ne ĉiam loĝantaj en la sama lando  
populara - ŝatata de multaj homoj; facile komprenebla por ne-fakuloj  
porcio - pli-malpli egala dividaĵo  
portreto - desegno prezentanta la vizaĝon de homo  
posteno - laborfunkcio; ejo, kie soldato estas starigita; ofico donita al iu  
potenco - scipovo (forte) efiki; (la dua potenco de 3 estas 3x3 = 9)  
pozicio - ejo, kie (aŭ tiel, kiel) io aŭ iu staras, sidas aŭ kuŝas; ejo de iu en la socio,...  
pozitiva - jesa, plusa  
praktiko - la farado, ne nur la pensado  
precipa - estra; ĉefa; plej grava  
prefikso - vortero, metata antaŭ radiko por ŝanĝi la signifon de la vorto  
preĝi - paroli al dio  
prelegi - fari paroladon pri iu temo al iu aro studentoj,...  
premio - objekto aŭ mono por tiu, kiu venkis en konkuro; aldona mono por aldona aŭ tre bona laboro  
prepozicio - [en, sur, tra, al, antaŭ, kun, per, por,...]  
pretaksto - ŝajna kialo, eldirita por kaŝi la veran kialon  
pretendi - postuli ion, dirante, ke oni havas rajton pri ĝi; aserti sian propran gravecon  
preventi - fari tiel, ke io ne povos okazi  
prezidento - estro de ŝtato  
prezidi - estr(ad), direkti  
prezo - kiom da mono oni devas pagi por io, kosto  
principo - ĉefa regulo de farado, scienco,...  
printi - (komputil)presi  
privata - ne de aŭ por ĉiuj  
probabla - tia, ke ĝi estas vera aŭ ke ĝi okazos, ke ĝi ne estas vera aŭ ke ĝi ne okazos  
procedi - uzi difinitajn rimedojn por atingi sekvon aŭ por efektiviigi ion; agi laŭ metodo  
procento - elcent(a)ĵo  
proceso - juĝafero; natura sinsekvo (de okazaĵo)  
profeto - kiu scipovas antaŭdiri estontajojn; kiu scipovas klarigi la dian volon  
profunda - kun granda mezuro inter la malferma ero kaj la ferma ero (profunda rivero)  
progresi - kreski, evolui, antaŭeniri; atingi pli kaj pli  
projekcii - sendi luman bildon sur platon  
prokrasti - malfruigi, postigi; ne fari nun, sed (eble) poste  
proksima - apuda, malfora  
proksimume - ne precize; pli-malpli  
proleto = proletario - homo, kiu povas vendi nur sian laborforon por vivteni sin  
promeni - iradi, iri por plezuro  
prononci - elparoli; formi vortojn (parolsonojn) per la buŝo  
propagandi - reklami ideon; disfamigi  
propedeŭtiko - enkonduka/prepara lernigado  
proporcio - rilato (laŭ mezuro) inter eroj de io, inter si, kaj al la tuto; kiam la grandeco de unu afero pliiĝas kaj malpliiĝas same aŭ simile kiel la grandeco de alia afero  
proprietajo - havaĵo, propraĵo  
prosperi - esti en bona, sukcesa okazaĵo  
protekti - gardi, helpi iun kontraŭ malbono aŭ danĝero  
protesti - diri, ke oni estas kontraŭ al io (kion oni opinias malbona); diri, ke oni ne ŝatas, ke iu faras ion  
protokolo - preciza skribaĵo pri kunveno aŭ okazaĵo  
proverbo - kutima diraĵo kun leginda signifo  
provinco - historia subdividaĵo de lando  
provizora - ne ada; dum iom da tempo; por iom da tempo  
provizi - havigi ĉion bezonatan al iu/io

provoki - ekfari pli-malpli atakante (al batalo, ...)  
prudenta - (iu:) scipova precize prijuĝi la aferojn; uzanta tiun scipovon; (io:) bone pripensita, ne malsaĝa  
prunto - dono por posta redono  
pseŭdonimo - kaŝnomo  
psiko - tuto de la konsciaj kaj nekonsciaj spiritaĵoj  
okazaĵoj de homo  
psikologio - scienco pri la homa konsciaj kaj nekonsciaj spiritaĵoj  
publika - por ĉiuj, kiuj volas aŭdi, uzigi, ĉeesti,...  
pudro - pulvoro kolora, odora (por vizaĵo)  
pugno - mano kun fleksitaj kaj kunmetitaj fingroj  
pugo - postaĵo; korpoero, sur kiu homo sidas  
pulmo - ero en la korpo, per kiu oni spiras  
pulo - saltanta fi-insekto (trinkas sangon)  
pulvero - vesto por la supra ero de la korpo, kiun oni surmetas, trametante la kapon kaj la brakojn  
pulvo - eksplodema pulvoro por pafi pumpi - eligi, altigi aŭ movi fluaĵojn per maŝino  
pupilo - la ero de la okulo, kie lumo povas eniri  
pupo - ludilo en formo de homo aŭ besto  
purpura - kun ruĝe-blua koloro  
puso - densa flaveta likvaĵo, konsistanta el vundinta korpo aŭ haŭto  
puŝi - (provi) movi ion, premante al ĝi; maltiri  
puto - fosaĵo farita de homo, el kiu oni prenas akvon  
putri - malboniĝi (mortinta besto, frukto, manĝaĵo,...)  
rabato - malpliigo de mano, kosto (pro antaŭpago, amikeco, malboniĝo de io,...)  
rabi - per forto forpreni ies posedaĵon  
raboti - platiĝi arbaĵojn fortranĉante maldikajn erojn  
racio - la homa pensadaĵo, kiu ebligas malkovri kaj formuli la leĝojn de la naturo, krei (ne instinkto, fantazio,...)  
radiatoro - (ero de) maŝino, kiu varmigas; ero de maŝino, kie akvo malvarmiĝas kaj tiel malhelpas trovamiĝon de maŝino,...  
rafano - ene blanka manĝebla radiko de kruĉflora herbo  
rajdi - sidi sur iranta besto (ĉevalo,...); sidi sur biciklo kaj veturi  
rakedo batilo por ludo  
raketo - arta fajraĵo, pafata en aeron, kiu tie eksplodas kaj disĵetas fajrerojn; objekto "pafata" en la kosmon, aŭ (kun eksplodaĵo) sur malamikam landon  
rampi - movi sin, tuŝante la teron per la korpo; kuŝmoviĝi  
rango - ejo laŭ graveco (kompare kun pli gravaj kaj malpli gravaj); ejo laŭ rajto estri  
raporti - rakonti (buŝe aŭ skribe) pri tio, kio okazis  
raso - aro da kreskigitaj kreskaĵoj kaj bestoj reproduktitaj tiel, ke iuj variaĵoj fariĝis pli-malpli konstantaj; tre malpreciza divido de la homaro laŭ kelkaj facile videblaj ecoj (koloro de la haŭto, formo kaj koloro de la haroj,...)  
raŭka - (voĉo:) kun malklara sono (ekzemple pro malvarmumo)  
razi - forpreni harojn per akra ilo  
reakcio - efiko de unu substanco al alia; servola reago (de korpo aŭ spirito) pro ago; antaŭenmovo pro ellaso de movo malantaŭen; agado por restarigi bonan politikan sistemon  
recenzi - skribi (aŭ rakonti) sian opinion pri iu verko aŭ okazaĵo  
recepto - preciza priskribo, kiel prepari ion (manĝaĵon,...)  
recikligi - re-uzi ion el forĵetaĵoj  
redakti - skribe zorge esprimi (siajn pensojn); zorge prilabori la skribaĵojn de alia; prizorgi la enhavon de novaĵpapero,..., elektante la artikolojn kaj korektante tiujn (redaktoro - redaktisto)  
redukti - malpligrandigi; malpligravigi



supozi - ne scii, sed pensi, ke io estas tia aŭ tia surda - ne povanta aŭdi surprizi - veni aŭ fari ion neatendite; mirigi per io neatendita; mirigi, ĉar neatendita surtuto - longa (labor)vesto super la aliaj vestoj suspekti - sen pruvo pensi, ke io malbona okazis aŭ ke iu faris ion malbonan susuri - eligi malfortan sonon, kiel de papero suveniĝo - memoraĵo svati - (duon)profesie serĉi kaj proponi iujn por edz(in)igi sveni - (dum mallonga tempo) maltrovi la konscion kaj la scipovon movi sin svingi - rapide, ripete mov(et)j ion tien kaj reen en aero; movi malantaŭen kaj ĵeti antaŭen ŝakalo - besto simila al maldika hundo ŝalmo - seka herbtubo ŝamano - homo, kiu povas rilati al supernaturaj fortoj ŝampuo - harlavo, harlavilo ŝanceli - tiel malforti ion tien kaj reen, ke tio ne plu firme staras ŝaŭmo - fluaĵo kun multege da globetaj ŝelo - pli-malpli firma ekstera kovraĵo de frukto, ovo,... ŝimo - ĝenerala nomo por etaj fungoj (kreskantaĵ sur malbona pano,...) ŝiri - distire rompi (papero, ŝtofon) ŝirmi - gardi ion aŭ iun kontraŭ ion malbona aŭ maluzinda, metante sin inter la kialo kaj tio aŭ tiu ŝmiri - meti de iu substanco sur ion per frotado; faciligi glitadon aŭ turniĝadon (de maŝino), metante grasan substancan aŭ oleon ŝoforo - kondukisto de aŭto, buso,...; veturigisto ŝoko - malĝojigo; spiritotremo; subita nerva misfunkcio ŝoveli - for-maltiri per plataĵo ŝovi - maltiri objekton glitigante ĝin; enmeti ion ŝpari - ne uzi ĉion, por povi poste uzi la reston; meti monon en specialan ejon por posta uzo ŝpruci - rapide eligi fluaĵon ŝraŭbo - metala fiksilo ŝrumpi - kuntiriĝi, malpligrandiĝi (pro sekeco, maljuniĝo,...) ŝtalo - tre malmola metalo el fero (Fe) kun iom da (C) ŝtupo - mallonga, dika, peza ero da arbaĵo ŝtopi - fermi truon, plenigante ĝin ŝtormo - tre forta vento, ofte kun ĉielakvo,... ŝtrumpo - plenpiedkovraĵo; (ĝenerale ŝtofa) vesto por plenpiedo ŝuldi - ankoraŭ devi pagi al iu; ankoraŭ devi fari por iu ŝveli - pligrandiĝi; plidikiĝi ŝvito - fluaĵo el haŭto (pro timo, varmego aŭ forta laboro) tabako - eroj de sekigitaj folioj por fumado tablojdo - sanigilo/dolĉaĵo en formo de plata rondeto tajdo - kutime dufoje tage movo de mara akvo tajli - eltranĉi el ŝtofo la erojn por fari veston tajloro - tiu, kiu kunkudras vestojn tajpi - maŝinskribi taksio - veturilo kun ŝoforo, per kiu unu aŭ multaj homoj, kontraŭ pago, povas veturi al voleganta ejo talio - la mezo de la homa korpo talpo - insektomanĝa besto vivanta tute sub tero tapeto - murpapero tapiŝo - kovraĵo sur planko (aŭ sur muro) tavolo - kiomo de iu substanco sur la tuta surfaco de alia substanco teamo ludantaro de unu flanko tedi - kiala malbonan senton, pro tro longa ado, pro troa ripetado, pro ne sufiĉa intereseo,... tegi - tute kovri per tuko aŭ per alia afero, ofte ne (aŭ ne facile) forprenebla tegmento ~ domkovraĵo; supraĵo, kovraĵo de domo

tekniko - tuto de metodoj por produkti ion; maniero de farado teko - mansako, dokumentujo, paperujo teksi - dense interkruciĝi fadenojn por fari ŝtofon telegrafo - maŝino por transsendi informojn je granda distanco, per interkonsentitaj signoj; telegramo - sciigo sendita per telegrafo telekinezo - perpensa movado temperaturo - varmo-kiomo; tio, kion oni mezuras per gradoj (°C, °F) tenaĵo - prenilo el du kruce ligitaj metalaj eroj tendenco - ada emo al io, al iu celo, aŭ en iu direkto tenera varmsenta, molsenta teniso - sporto (ĵeti globeton per batilo trans reton) teologio - scienco, diesploro teorio - sciencajo; pripensado de reguloj, laŭ kiuj oni faru ion, tion ne farante teraso - plialtigita, plata ejo (apud domo, ekster kafejo, en parko,...); ŝtup(ar)je aranĝita kampo tereno - terspaco, rigardata laŭ ĝia uzeblo por homa agado - aŭ kiel ejo, kie io okazas teritorio - la tero, kiu apartenas al iu ŝtato, urbo,...; la regiono, super kiu iu regas aŭ havas juĝpovon termino - bone difinita vorto de iu fako aŭ scienco terni - subite brue elspiri per la nazo (kaj la buŝo) teroro - estrado (aŭ provo ekestri) per (ne-antaŭdirebla) suferigeco, terurante la popolon; teroristo: iu, kiu provas atingi iun celon per neatendita(j) suferiga(j) atako(j) al senkulpaj homoj teruro - timego tigo - branĉeto; pli firma ero de herbo, portanta folion aŭ floron tikli - kiala per tuŝetoj senton, pro kiu oni ekridas tinti - fari la sonon, kiun faras du vitrotasoj, kiam tiuj interbatiĝas tipa - kun klaraj ecoj de sia speco titolo - surskribo (nomo) de libro, artikolo, teatraĵo, filmo,...; respekta (aldona) nomo por homo tomatato - ruĝa aŭ flava frukto de herbo tomo - fosaĵo farita en tero por en ĝin meti mortinton tondi - disigi per du ligitaj tranĉiloj; tranĉi harojn tondro - ĉiela bruego tono - muzika sono kun difinita alto; eco de voĉo/koloro torli - turni unu finponton de objekto en unu direkto kaj la alian finponton en kontraŭa direkto torento - rapidege fluanta monta rivero torturi - suferigi iun, por ke tiu kontraŭvole diru ion trabo - longa, dika ero de arbo trafiko - veturado de homoj, informoj,...; (kiomo de) la veturantoj kaj irantoj en iu ejo tragedio - teatra verko; teatraĵo kun malfeliĉa fino; malfeliĉega okazaĵo tragika - kun (ne-evitebla) malfeliĉa fino trajno - vagonaro trajto - linio de la vizaĝo; eco/maniero de homo traktato - skriba interkonsento inter ŝtatoj trakti - interparoli pri iu afero por veni al iu atingiĝo; esplori temon; prilabori ion; (laŭ iu maniero) agi al iu homo traktoro - veturilo por trenado de ŝarĝveturiloj aŭ kampokulturaj maŝinoj transitiva - transira; povanta havi objekton, finiĝantan per -n ("rektan" objekton) trejni - lernigi kaj ekzerci por atingi certan scipovon trempi - malsekiĝi, lasante ion iom pli longe en fluaĵo treni - tiri post si (kun malfacilo) pezan objekton trezoro - riĉaĵo tribo - (kune vivanta) homareto kun komuna(j) prapatro(j) tribunalo - juĝistaro; juĝejo kun multaj juĝistoj

triko - produkti ŝtofon (el fadeno) triista - malgaja, malĝoja tritiko - herbo, por fari panon trompi - antaŭpense misinformigi; kredigi, ke io estas alia, ol tio estas trotuaro - ero de vojo por piedirantoj, apud la vojo por veturiloj trudi - devigi iun fari ion kontraŭvole; devige akceptigi ion trunko - arbtubo trupo - ĉiuj artistoj de teatro kune; soldataro tualetto - la aranĝado por igi sin aspekti pura kaj bela tumulto - kiam multaj homoj senorde kuras kaj bruas tunelo - vojo subtera aŭ subakva tuno - 1000 aŭ 1016 miloj de gramoj turismo - veturado por plezuro, por ekkoni (malsamajn) ejojn kaj landojn,... turmenti - kiala al iu grandajn (korpajn) suferojn turo - (tre) alta (ero de) konstruaĵo tusi - subite elspiri, kun sono (pro malsano) ultimato lasta postulo/propono uniformo - rekoniga serva vesto (ekzemple de soldato) unika - (unu) sola; okazanta nur unu fojon urĝa - tuja, malpli longiga; rapidiga (afero) urino - pli-malpli flava fluaĵo, eligata el la korpo urtiko - herbo, kiu ĉe tuŝo kialas akrasenton, doloron Usono - la Unuiĝintaj Ŝtatoj de (Nord-)Ameriko utila - uzinda, uzebla; bona por esti uzata uzino - metalprilaborejo, riparejo; konstruaĵo, kie oni produktas aĵojn per maŝinoj vadi - iri tra akvo vagi - iri de ejo al ejo sen difinita celo vakcino - substanco enmetebla en korpon aŭ trinkebla kontraŭ malsano vakso - substanco, el kiu abeloj konstruas ĉelojn; simila substanco farita de aliaj insektoj, aŭ artefarita de homoj vakuo - spaco, en kiu estas (preskaŭ) neniam da substanco, eĉ ne estas aero valida - (dokumento, decido) plenumanta ĉiujn kondiĉojn postulatajn de la leĝo, tiel ke ĝi havas la laŭleĝajn efikojn valizo - per unu mano portebla vesto, en kiu oni transportas bezonataĵojn dum veturado valo - malalta ero inter altaĵoj, inter montoj valuto monunuvo vango - ero de la vizaĝo, inter buŝo kaj orelo vanta - ne atentinda, ĉar tute malgrava; ŝatanta okupiĝi pri malgravaĵoj vaporo - akvogaso; gasforma akvo (pli ol 100°C) varbi - ekigi iun, fariĝi soldato; ekigi iun, fariĝi ano de partio,... varo - objekto farita por vendo varti - gardi kaj prizorgi iun, kiu bezonas tion pro malforteco aŭ juneco vasta - (kun granda) mezuro en multaj direktoj vazo - iu ujo; relative alta ujo kun pli-malpli larĝa malfermaĵo (el vitro, metalo,...) (por teni fluaĵon) vegan - senbestaĵisto, bestaĵevitisto vegetalo - multĉela vivaĵo ne besto [kreskaĵo, fungo] vegetara - tia, ke oni ne manĝas produktojn de (mortigitaj) bestoj vejno - tubeto en la korpo, tra kiu sango fluas de organoj al la koro vekti - maldormigi; igi maldorma; fini ies dormon [vekiĝi - ekmaldormi] velki - maltrovi vivosukojn; sekiĝi velo - granda ŝtofo fiksita al arbakolono de akvo-veturilo (ŝipo), por kapti venton veluro - densaa ŝtofo kun mola, hara supraĵo veneno ~ mortigaĵo/finvivaĵo/finvivmanĝaĵo; substanco, kiu mortigas vivantajn ĉelojn (aŭ tutan vivulon)

venĝi - kiam A faras malbonon al B (aŭ parenco aŭ amiko de B), ĉar B faris malbonon al A (aŭ parenco aŭ amiko de A) ventro - meza ero de la korpo verbo - i-vorto, farvorto; vorto, en Esperanto kun unu el la finaĵoj "-i -as -is -os -us -u" vergo - pli-malpli longa, maldika, fleksebla bastono vermo - mola, senpieda serpento-simila besteto versio - priskribo aŭ prezento de iu okazaĵo, el la vidpunkto de unu homo; unu el multaj (sinseke faritaj) formoj de iu verko verso - unu linio de kanto,... verŝi - flugi fluaĵon el ujo vertikalo - linio je orta angulo (90°) al la surfaco de senmova akvo; linio rekte (mal)supren verzo - supro de homa kapo veruko - elstara neregulaĵo de la haŭto vestiblo enirĉambro veŝto - vesto inter ĉemizo kaj jak(et)o veti - interkonsenti, ke oni ricevos certan monsumon (aŭ objekton aŭ servon), se io okazos (kontraŭ fiksa pago) veziko - sakeca ero en la korpo; pli-malpli globforma araĵo da aero en fluaĵo viadukto - ponto kun vojo aŭ fervojo super vojo, fervojo, rivero,... vibri - ofte regule tremi vic - [sekvanta en serio; anstataŭa] vico - multaj homoj aŭ objektoj, en unu linio metitaj, unu post la alia (unu apud la alia aŭ unu malantaŭ la alia); multaj sinsekvaj okazaĵoj vidvo - viro, kies edzino mortis vigla - agema; moviĝema; gaja viktimo - tiu, al kiu okazis io malbona vilaĝo - ne tre multaj (kelkdek, kelkcent, kelkmil) domoj kune, ofte kun kampoj inter la domoj vinagro - citrongustaĵo farita el alkoholo vino - fruktalkoholo; malforta (12% aŭ malpli) alkohola trinkaĵo el fruktoj vintro - malsomero violo - kreskaĵo kun kvineraj floroj (ĝardenaj ofte trikoloraĵ) vipo - batilo konsistanta el tenilo kaj ŝnuro virga - neniam seksuniĝinta (homo, besto); neniam kulturita (tero) virto - konstanta emo fari bonon kaj eviti malbonon virtuala - ne reala, sed videbla sub certaj kondiĉoj viruso - eta io kialanta malsanon (transprogramante ĉelojn por produkti malsanigaĵ substancojn kaj virus-kopiojn) viŝo - forpreni malpuraĵojn per frotado (ofte per tuko); simile forigi skribaĵojn (de muro, tabulo,...) vizo - (en pasporto) permeso por en-/el-/tra-iri landon vojaĝi - iri aŭ veturi al malproksima ejo, aŭ de ejo al ejo (al ejoj...) (dum multaj tagoj) vokalo - parolsono en Esperanto: [a e i o u] volonta - faranta ion kun (aŭ por) plezuro (ne profesie, ne pro devoj) volumeno - ero de spaco okupata de korpo, objekto,... volvi - (multfoje) ĉirkaŭmeti ion ĉirkaŭ io alia vomo - efjeti per la buŝo la enhavon vosto - la malantaŭa elstara ero de birdo, besto vualo - travidebla tuko antaŭ vizaĝo vulkano - monto formiĝinta el elfjetiĝintaj fluaĵaj eroj de Tero; monto, tra kiu efjetiĝas aŭ efjetiĝis fluaĵaj eroj de Tero zigzago - linio en formo de Z aŭ /V zinko - metalo (Zn) zipo - tirfermilo zoo - bestĝardeno zoologo - bestosciencisto zumi - aŭdigi adan, malakran bruon ("zzzzz" aŭ "mmmmm")